# PREĜOSEMAJNO

# POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ 2016

## Vokitaj por anonci al ĉiuj la mirindaĵojn de Dio

*(kp. 1 Pet 2,9)*

*18.-25.01.2016*

Romo/Zagrebo, januaro 2016

Tradukis IKUE-anoj kaj aliaj bonvolaj Esperantistoj:
- Antonio *De Salvo*, Guidonia, Italio
- Bernard *Schwaiger*, Arnstadt, Germanio
- Bogusłav *Sobol*, Milanówek, Pollando
- Daniel *Chevalier*, Ecquevilly, Francio
- Doris *Legat*, Dornbirn, Aŭstrio
- Mons. Gabriel *Anda*, Edea, Kamerunio
- Giovanni *Daminelli*, Sesto S. Giovanni, Italio
- Laura *Gentili*, Arezzo, Italio
- Marija *Belošević*, Zagreb, Kroatio
- Mike *Leon*, Lower Hutt, Novzelando
- Paola Birgit *Giommoni*, Arezzo, Italio
- Pavol *Petrik*, Pečovská Ves, Slovakio
- sac. Serhij *Prutko*, Kievo, Ukrainio
- Veronika *Kirsch*, Szekszárd, Hungario
- Vitor Luiz *Rigoti Dos Anjos*, Serra (Espírito Santo), Brazilo
- Wilson *Aragão Filho*, Vitória, Brazilo

Reviziis: Antonio *De Salvo*

Kompilis kaj grafike aranĝis: Marija *Belošević*

*La E-lingvaj tekstoj estas faritaj laŭ la tekstoj aprobitaj de la Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC)*

**La tekstoj ne estas por komerca uzo.**

IKUE, www.ikue.org
Zagrebo/Romo, januaro 2016

Estimataj,

En la manoj la kvinan jaron sinsekve vi tenas libreton, kiu estas komuna tradukado de deksesopo de bonvolaj personoj kiuj per disponigo de sia libera tempo ankaŭ montras propran elekton: esti guteto en la maro da deziroj „Ke ĉiuj estu unu“.

Denove ĉi jare, ne pretendante grandecon, tamen oni povas konstati ke la teamo iel montras la universalecon, tutglobecon en la pozitiva senco: dekdu landoj, kvar kontinentoj!

Certe pluraj inter vi ĉeestos lokajn preĝokunvenojn kaj eble en la manoj tenos tiujn tekstojn en propra lingvo. Pro tio certe iuj starigos demandon kial la traduko al Esperanto estis farita?

Mi deziras memorigi al vi, ke jam de kelkaj jaroj ĉe la ttt-ejo de IKUE aperas tradukoj de la ĉefaj tekstoj. Interalie, sur tiuj tekstoj baziĝis ankaŭ la Ekumenaj diservoj dum la UK en Bjalistoko, Hanojo, Rejkjaviko, Bonaero kaj Lillo kaj ĉiujtagaj preĝoj dum la Ekumenaj E-kongresoj en Trento kaj Strasburgo.

Ĉi tiu kompilaĵo do havas pluran utileblecon. Jen kelkaj ideoj:

- dum la Preĝosemajno, en via loko vi povos kolekti Esperantistojn je E-lingva preĝo kaj meditado super la tekstoj (ne forgesu „kie estas du aŭ tri kolektitaj...“)
- preĝorondoj jam utiligas diversajn interretajn kontaktojn, do oni povos similan fari ankaŭ dum la Preĝosemajno
- oni povos ankaŭ sola preni tekston de la koncerna tago kaj mediti super la elektitaj bibliaj tekstoj
- certe la kompilaĵo estas varme rekomendata al la organizantoj de E-aranĝoj, ĉar necesas nur elekti „tagon“ kaj okazigi ekumenan preĝokunvenon; grandaj aranĝoj kiel Universala Kongreso, kaj simile jam havas pretan tekston por la Ekumena diservo

Gravas la mencio, ke la tekstoj ne estas nur por la semajno inter la 18-a kaj 25-a de januaro. Libere uzu ilin dum la tuta jaro, ĉar preĝi neniam sufiĉas.

Se vi iel utiligos la tekstojn, bv. sciigi, ĉefe se vi havis iun alian ideon ol supre menciitajn.

Ĉe la fino de ĉi linioj, mi dankas al ĉiuj kuntradukintoj kaj mi esperas ke ĉi sperto estas kuraĝiga, kaj malfermis perspektivon por iu estonta simila laboro.

Pacon kaj bonon!

Marija Belošević, vicprezidantino de IKUE

## BIBLIA TEKSTO

(kp. 1 Pet 2,9-10)

*Sed vi estas gento elektita de Dio, reĝa pastra popolo, nacio sankta, popolo akirita de Dio por si, por ke vi proklamu al ĉiuj liajn mirindajn farojn. Li vokis vin el mallumo por vin konduki en sian lumon mirindan.*
*Iam vi ne estis lia popolo, sed nun vi estas popolo de Dio. Antaŭe vi estis forigitaj el la mizerikordo, sed nun vi ricevis mizerikordon.*

## TEOLOGIA-PAŜTISTA ENKONDUKO
### Vokitaj por anonci al ĉiuj la mirindaĵojn de Dio

*(kp. 1 Pet 2,9)*

La baptofonto plej malnova, kiu troviĝas en Latvio, datiĝas de la epoko de sankta Meinardo, la granda evangelizinto de ĉi tiu nacio. Origine, ĝi estis lokita en la katedralo de Ikšķile, hodiaŭ ĝi estas en la luterana Katedralo de Rigo, la landa ĉefurbo. La lokiĝo de la baptofonto, tiom apuda al la ornamo de la predikejo, elmontras klare, kaj ĝian rilaton inter la Bapto kaj la anonco, kaj la alvokiĝon, komunan al ĉiuj baptitoj, por „anonci la mirindaĵojn" de la Sinjoro. Ĉi tiu alvoko konsistigas la temon de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj de la jaro 2016. Inspiritaj de la versiklo de la *Unua Letero de Petro*, la membroj de la diversaj kristanaj eklezioj pretigis la tekstojn por la Semajno.

La arkeologia elmontro sugestas, ke la kristanismo estis enkondukita en orientan Latvion en la 10-a jarcento fare de Bizancaj misiistoj. Tamen la plejmulto de la dokumentoj datigas la kristanajn originojn de Latvio en la 12-a kaj 13-a jarcentoj, dank' al misiista agado de sankta Meinardo kaj, poste, de aliaj misiistoj germanaj. La ĉefurbo, Rigo, estis unu el la unuaj urboj alprenintaj la ideojn de Lutero en la 16-a jarcento. En la 18-a jarcento Moravianaj misiistoj (Herrnhut Brethern) donis novan elanon kaj profundigis la kristanan kredon dum la jarcentoj. Iliaj posteuloj eble rolis unuarange en la starigo de la nacia sendependo en 1918.

La pasinteco, pro siaj periodoj de konflikto kaj de sufero, estigis videblajn konsekvencojn en la nuntempa vivo de Latvio. Estas malĝoje, ke la perforto praktikita de kelkaj unuaj misiistoj kaj de krucmilitistoj donis kontraŭ-atestadon de la evangelia mesaĝo. Tra la fluo de la jarcentoj, la latvia lando estis okazejo de religiaj kaj politikaj bataloj fare de la diversaj potencoj naciaj kaj religiaj. La sinsekvo de politikaj potencoj en la malsamaj partoj de la Lando ofte estigis ŝanĝojn en la kredaparteno de la personoj. Hodiaŭ Latvio estas krucvojo, kie interkruciĝas regionoj katolikaj, protestantaj kaj ortodoksaj.

Latvio ekzistis kiel Ŝtato de la jaro 1918 ĝis 1940, konsekvence unue de la Unua Mondmilito kaj poste de la faloj de la germana kaj rusa imperioj. La Dua Mondmilito kaj la sekvaj jardekoj, kun iliaj ideologioj totalismaj kaj ateistaj – Naciismo kaj Komunismo – kunportis ruinigojn al la lando kaj al la popolo de

Latvio, ĝis la disfalo de Sovetio en 1991. Dum tiuj jaroj la kristanoj estis unuiĝintaj en komuna atesto de la Evangelio eĉ ĝis la martiriĝo.

La *Bishop Sloskans' Museum* en Latvio konservas tian komunan ateston, gardante liston de martirigitaj kristanoj de la Eklezioj ortodoksa, luterana, baptista kaj katolika. La kristanoj malkovris sian komunan apartenon al la „reĝa pastra popolo", pri kiu parolas la apostolo Petro, ankaŭ per longdaŭraj torturoj, ekzilo kaj morto pro sia kredo en Jesuo Kristo. Ĉi tiu kunligo en la sufero estigis profundan komunecon inter la latvaj kristanoj: pere de tio ili malkovris sian baptan pastrecon, kaj en ĝi ili povis oferi siajn suferojn kunigitajn kun la suferoj de Kristo por la bono de la proksimulo.

La sperto preĝi kaj kanti kune – inkluzive de la Nacia himno *Dio benu Latvion* -, tre gravis por la reakiro de la sendependo de Latvio en 1991. Fervoraj preĝoj por la libereco estis levitaj en multaj preĝejoj de la tuta urbo. Kuniĝintaj en la kanto kaj en la preĝo, la sendefendaj civitanoj konstruis barikadojn en la stratoj de Latvio kaj restis unu apud la alia spite de la sovetaj tankoj.

La malhelo de la totalismoj de la 20-a jarcento, tamen, igis multajn homojn indiferentaj antaŭ la vero de Dio Patro, lia revelacio en Jesuo Kristo kaj la viviga povo de la Sankta Spirito. Sed la post-soveta periodo estis renoviga periodo por la eklezioj. Multaj kristanoj nun renkontiĝas por kune preĝi en malgrandaj grupoj aŭ dum la ekumenaj celebroj. Konsciiĝintaj, ke la lumo kaj la graco de Kristo ankoraŭ ne trapenetris kaj transformis ĉiujn personojn en Latvio, la kristanoj volas kune labori kaj preĝi, por ke povu resaniĝi la vundoj, historiaj, etnaj, ideologiaj, kiuj ankoraŭ malbonigas la societon.

**La alvoko esti "popolo de Dio"**

La apostolo Petro sin turnas al la kristanoj dirante, ke dum ilia serĉo pri la senso de la vivo antaŭ ilia renkontiĝo kun la Evangelio, ili ne estis popolo. Sed pere de la alvokiĝo esti „popolo akirita de Dio por si mem", ricevinte la povon de la dia savo en Kristo Jesuo, ili iĝis „popolo de Dio". Ĉi tiu realo esprimiĝas en la Bapto, komuna al ĉiuj kristanoj, per kiu ni renaskiĝis el la akvo kaj el la Spirito (kp. Joh 3,5). Per la Bapto ni mortas el la peko por reviviĝi kun Kristo al nova vivo de graco en Dio. Resti en ĉi tiu nova identeco en Kristo estas daŭra ĉiutaga defio.
*Kiel ni komprenas nian komunan alvokiĝon esti „popolo de Dio"?*
*Kiamaniere ni esprimas nian baptan identecon kiel „reĝa pastra popolo"?*

**Aŭskulte de la "mirindaĵoj" de Dio**

La bapto malfermas al ni novan emociigan iradon en la fido, kiu laŭlonge ĉiujn epokojn, arigas ĉiun novan kristanon en la dian popolon. La vorto de Dio – la Skriboj sur kiuj kristanoj de ĉiuj tradicioj preĝas, studas kaj primeditas – estas la fundamento de la efektiva, ankaŭ se neplena, komuneco. En la tekstoj de la Biblio, kiujn ni havas komune, ni aŭskultas la savajn agadojn de Dio en la historio de la savo, kiel la liberigon el la sklaveco de Egiptio, kaj la grandan mirindaĵon de Dio: la releviĝon de Jesuo el la mortintoj, kiu donis al ni ĉiuj la eniron al nova vivo; krom tio, la legado de la Biblio, en sinteno de preĝo, kondukas la kristanojn al rekono de la mirindaĵoj de Dio ankaŭ en ilia vivo.

*Kiel ni rimarkas kaj respondas a la „mirindaĵoj de la Sinjoro" en la kulto kaj en la preĝo, en la agado favore al la justeco kaj al la paco?*
*Kiamaniere ni valorigas la Skribon kiel vivigan Vorton, kiu vokas nin al plia unueco kaj al pli granda misio?*

**Respondo kaj anonco**

Dio elektis nin ne kiel privilegiulojn: li sanktigis nin ne ĉar la kristanoj estas pli virtaj ol la aliaj; li elektis nin por atingi unu celon. Ni estas sanktaj tiom, kiom ni estas engaĝitaj en la dia servo, kiu konsistas en porti lia amo al ĉiuj. Esti pastra popolo, signifas esti je la servo de la mondo. La kristanoj travivas sian baptan alvokiĝon kaj donas ateston al la mirindaĵoj de Dio en pluraj manieroj:
*Sanigante la vundojn*: la militoj, la konfliktoj kaj la misuzoj vundis la vivon de la latva popolo, kaj de multaj aliaj landoj, je emocia kaj rilateca niveloj. La graco de Dio helpas nin peti pardonon por la baroj, kiuj malhelpas repaciĝi kaj resaniĝi, ricevi mizerikordon kaj kreski en sankteco.
*Serĉante la veron kaj la unuecon:* la konscio pri nia komuna identeco en Kristo, vokas nin strebi por respondi al la disputoj, kiuj ankoraŭ disigas la kristanojn. Ni estas vokataj, kiel la disĉiploj survoje al Emmaus, kune partigi niajn spertojn kaj tiel malkovri, ke, en nia komuna pilgrimado, Jesuo Kristo estas meze de ni.
*Sin devigante aktive por la pliigo de la homa digno*: la kristanoj, kiuj estis kondukataj „ekster la tenebrojn" al la „mirinda lumo" de la Regno, agnoskas la eksterordinaran dignon de ĉiu homa vivo. Per komunaj planoj de socia kaj karitata servo, ni estas petataj atingi la malriĉulojn, la bezonulojn, la misdependulojn kaj la ekskluzivitajn.
*Konsidere de nia engaĝiĝo por la unuiĝo de la kristanoj, pro kio ni devas pardonpeti?*
*Konsciante pri la dia mizerikordo, kiel ni klopodas pri la sociaj kaj karitataj planoj kun la aliaj kristanoj?*

**Prezentado de la materialoj**

La ekumena celebro utiligas kelkajn simbolojn: Biblion, lumigan kandelon kaj salon por vide esprimi la "mirindaĵon", kiujn, kiel baptitaj kristanoj, ni estas vokataj anonci al la mondo. Kaj la lumo kaj la salo estas bildoj utiligitaj de Jesuo en sia Parolo de la Monto (kp. Mat 5,13-16). Ĉi tiuj bildoj priskribas nian kristanan identecon: „Vi estas la salo... Vi estas la lumo..." kaj priskribas nian mision: 2salo de la mondo... lumo de la mondo...".

La salo kaj la lumo estas bildoj de tio, kio la kristanoj devas doni al la nuntempaj homoj: ni ĉerpas el dia vorto, donanta saporon al la ofte sensignifa kaj malplena vivo; kaj ni ĉerpas el vorto, kiuj gvidas kaj helpas la homoj vidi kaj kompreni sin mem en la mondo.

Oni petas la reprezentantojn de la diversaj ekumenaj projektoj en Latvio pripensi pri aparta postulata temo kaj alporti sian sperton de komuna laboro. Iliaj prikonsideroj konsistigos la bazon de la materialo proponata por ĉiu tago de la tagoko de la Preĝosemajno.

## PREPARO DE LA MATERIALO

## POR LA PREĜOSEMAJNO POR UNUECO DE KRISTANOJ 2016

La preparlaboron lige al la temo de la ĉi jara Preĝosemajno por unuigo de kristanoj surprenis la grupo en kiu membris la reprezentantoj de diversaj partoj de Latvio, kiujn kunvokis la romkatolika ĉefepiskopo de Rigo Zbigņevs Stankevičs.

Apartan dankon ni direktas al:

- S-ino Anda Done (Luterana eklezio)
- S-ro Levi Ivars Graudins (Latva Preĝdomo por ĉiu popoloj)
- S-ino Zanna Hermane (de la „Vertikal Tv", elsendo de la dimanĉa matena kristana programo)
- S-ro Nils Jansons (Komunumo Chemin Neuf)
- Sr. Rita Refalo (Monaĥino de la movado Pro sanctitate)
- S-ino Velta Skolmeistere (Katolika porjunulara centro de la ĉefdiocezo Rigo)
- S-ino Gunta Ziemele (Katolika porjunulara centro de la ĉefdiocezo Rigo)

La tekstoj en ĉi tiu libreto estis finredaktitaj dum la kunveno de la Internacia komitato kiun nomumis Papa konsilio por antaŭenigo de unueco de kristanoj kaj de la Komisiono „Fido kaj Konstitucio" de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC).

La membroj de la Komitato renkontiĝis en septembro 2014 en la ĉefdioceza seminario de Rigo, kune kun la reprezentantoj de la latvaj eklezioj. Elkore oni dankas al mons. Pauls Kļaviņšn pro la grandanima gastigado dum la renkontiĝo, kaj ankaŭ al la personaro de la seminario kaj al la seminarianoj.

Apartan dankon oni direktas al Fr. Aivars Līcis kaj Fr. Kārlis Miķelsons kiuj faciligis la laboron de la Komitato. La partoprenantojn ili gvidis al la insulo de sankta Meinhardo sur la rivero Daugavi, proksime al Ikškilea, kie troviĝas la ruinoj de la unua katedralo (konsekrita en la jaro 1186), kaj al la luterana kaj katolika katedraloj de Rigo, same al la anglikana preĝejo de la Sankta Savanto en Malnova Rigo. Ĝuste tiuj vizitoj montriĝis valoregaj por la pretigo de la tekstoj.

## EKUMENA DISERVO

### Enkonduko al la liturgio

*La Latva redakcio-grupo sugestas, ke reprezentantoj de malsamaj eklezioj eniru portante Biblion, kandelon (kiu povas esti la Paska kandelo) kaj vazon kun salo. Ĝi ankaŭ proponas, ke po unu el tiuj simboloj estas provizita per ĉiu malsama komunumo. La Biblio povus esti metita sur la ambonon de legado, dum la salo kaj la kandelo povus lokiĝi jen proksime de la ambono, kiel simboloj de la Dia Vorto, jen proksime de la baptejo, kiel signo de nia bapta alvoko.*

*Korbo kun malgrandaj kandeloj povus ankaŭ esti aranĝita en la sanktejo, por ke, post la prediko, membroj de la kunveno povu bruligi individuajn kandelojn per la flamo enkondukita komence de la celebro.*

*Kvankam neniu aparta kanto estis nomumita, la latva prepara grupo sugestas himnojn al la Triunuo. Ĝi ankaŭ proponas, ke la* Kyrie eleison *kaj* Christe eleison *respondoj estu kantataj. Dum la Liturgio de la Vorto, la mallonga respondo de la kunveno estas montrita en la teksto. La enkonduko al legadoj prenas la terminon „eksplodo de amo", prenitan de la fondinto de la movado* Pro Sanctitate, *Guglielmo Giaquinta. Tiu movado estas vivanta en Latvio kaj iuj el ĝiaj membroj kontribuis prepari tiun celebron.*

*Post la konkludo:*

*La pano, precipe la nigra pano, estas Latva simbolo de gastamo. Kiam novaj loĝantoj ekloĝas en domo, estas kutime ke, kiel beno, amikoj al ili prezentu pan-molaĵon, sur kiun oni verŝis salon formkruce. La Latva prepara grupo invitas la kristanojn de la tuta mondo imiti tiun geston de gastamo dum la frata momento kiun ili kundividas, post la celebrofino.*

# CELEBRA RITO

Alvokitaj proklami la grandajn farojn de la Sinjoro (1 Pet 2, 9)

*C:Celebranto*
*K:Kunveno*
*L: Leganto*

### *I. Komenca kunveno*

**Malferma himno**

*La celebrantoj faras sian eniron. Ili povas kunporti Biblion, ekbruligitan kandelon kaj salon.*

**Vorto de bonveno**

C: Karaj amikoj en Kristo, kolektiĝintaj ĉi tie por ĉi celebro de unueco, ni dankas Dion pri nia digno kaj nia kristana alvokiĝo, tiel priskribita de Sankta Petro: „*Sed vi estas raso elektita, pastraro reĝa, nacio sankta, la popolo Diposedata, por ke vi proklamu la gloron de Tiu, kiu vokis vin el mallumo en Sian lumon mirindan*.“ (1 Pet 2, 9).

Ni preĝadas ĉi-jare kun la kristanoj de Latvio, kiu preparis ĉi celebron, esperante kreski en komuneco kun Nia Sinjoro Jesuo Kristo kaj kun ĉiuj niaj gefratoj, kiuj aspiras al unueco.

### *II. Preĝoj por peti la Sanktan Spiriton*

C : Sankta Spirito, Donaco de la Patro en Lia Filo Jesuo Kristo, restu en ni, malfermu niajn korojn kaj faru nin atentaj al via voĉo.

**K : Sankta Spirito venu sur nin.**

C : Sankta Spirito, Dia Amo, fonto de unueco kaj sankteco, montru al ni la Patran amon.

**K : Sankta Spirito venu sur nin.**

C : Sankta Spirito, Fajro de Amo, nin purigu malaperigante la tutan dividon de nia koro, de niaj komunumoj kaj en la mondo, por ke ni estu unu en la nomo de Jesuo.

**K : Sankta Spirito venu sur nin.**

C : Sankta Spirito, fortigu nian fidon en Jesuo, vera Dio kaj vera homo, Kiu portis niajn dividojn pekojn ĝis la krucon kaj kondukis nin al komuneco per lia resurekto.

**K : Sankta Spirito venu sur nin.**

C : Patro, Filo kaj Sankta Spirito, restu en ni por transformi nin en komunecon de amo kaj sankteco. Ke ni estu unu en Vi, kiu vivas kaj reĝas ĉiam kaj eterne.

**K : Amen.**

**Kanto de Laŭdo**

## *III. Repacigaj Preĝoj*

C : Dio invitas nin al repaciĝo kaj sankteco. Ke nia menso, nia koro kaj nia korpo pretiĝu bonvenigi la gracon de repaciĝo sur la vojo al sankteco.

*Silento*

C : Sinjoro, Vi kreis nin laŭ via bildo. Kiam al ni mankis respekto antaŭ nia propra naturo kaj antaŭ la mondo donita al ni de Vi, pardonu al ni. *Kyrie eleison*.

**K : Kyrie eleison**.

C : Sinjoro, vi invitas nin esti perfektaj kiel via ĉiela Patro estas perfekta. Kiam ni maltrafis rilate al sankteco, ĉesadis esti justaj homoj, kaj ne plu respektadas la rajtojn de homoj kaj ilian dignon, pardonu nin. *Christe eleison*.

**K : Christe eleison**.

C : Sinjoro de la vivo, la paco kaj la justeco, kiam ni transdonas kulturon de morto, de milito kaj de maljusteco, ni malsukcesas konstrui civilizon de amo, pardonu nin. *Kyrie eleison*.

**K : Kyrie eleison**.

C : Dio de Kompato, bonvolis Vi plenigi nin per via graco kaj via sankteco. Faru el ni apostolojn de amo tie, kie ni estu. Ni Vin petas per Kristo nia Sinjoro.

**K : Amen.**

### *IV. Proklamado de la Vorto de Dio*

L : La Vorto de Dio, kiun ni aŭdos estas eksplodo de amo en nia vivo.
**K : Ni danku al Dio.**

*Jes 55, 1-3*

Ho vi, ĉiuj soifantoj, iru al la akvo, kaj vi, kiuj ne havas monon; iru, aĉetu, kaj manĝu; iru, aĉetu sen mono kaj sen pago vinon kaj lakton. Kial vi donas monon por tio, kio ne estas pano? kaj vian laboron por tio, kio ne satigas? aŭskultu do Min, kaj manĝu bonaĵon, kaj via animo ĝuu grasaĵon. Klinu vian orelon, kaj venu al Mi; aŭskultu, por ke vivu via animo; kaj Mi faros kun vi interligon eternan pri la fidindaj korfavoroj, promesitaj al David.

L : Aŭdu kaj vi vivos.
**K : Ni danku al Dio.**

***Psa 145, 8-9.15-16.17-18***.

L : Mi benos Vian Nomon por ĉiam.
**K : Mi benos vian nomon por ĉiam**.

L : Kompatema kaj favorkora estas la Sinjoro,
Longetolera kaj kun granda boneco.
La Sinjoro estas bona por ĉiuj;
Lia favorkoreco estas super ĉiuj Liaj kreitaĵoj.

**K : Mi benos vian nomon por ĉiam**.

L : Ĉies okuloj estas turnitaj al Vi,
Kaj Vi donas al ili ilian manĝon en ĝia tempo.
Vi malfermas Vian manon
Kaj satigas favore ĉion vivantan.

**K : Mi benos vian nomon por ĉiam**.

L : Justa estas la Sinjoro en ĉiuj Siaj vojoj
Kaj bona en ĉiuj Siaj faroj.
Proksima estas la Sinjoro por ĉiuj, kiuj Lin vokas,
Por ĉiuj, kiuj vokas Lin sincere.

**K : Mi benos vian nomon por ĉiam**.

***1 Pet 2, 9-10***

Sed vi estas raso elektita, pastraro reĝa, nacio sankta, popolo Diposedata, por ke vi proklamu la gloron de Tiu, kiu vokis vin el mallumo en Sian lumon mirindan; kiuj iam estis ne-popolo, sed nun estas popolo de Dio; antaŭe nekompatitoj, sed nun kompatitoj.

L : Aŭdu kaj vi vivos.
**K : Ni danku al Dio.**

***Mat 5, 1-16***

En tiu tempo Jesuo, vidinte la homamasojn, li supreniris sur la monton, kaj kiam li sidiĝis, liaj disĉiploj venis al li; 2 kaj malferminte la buŝon, li instruis ilin, dirante:
Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.
Feliĉaj estas la plorantaj, ĉar ili konsoliĝos.
Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron.
Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos.
Feliĉaj estas la kompatemaj, ĉar ili ricevos kompaton.
Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion.
Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj.
Feliĉaj estas tiuj, kiuj estas persekutitaj pro justeco, ĉar ilia estas la regno de la ĉielo.
Feliĉaj estas vi, kiam oni vin riproĉos kaj persekutos kaj false vin kalumnios pro mi.
Ĝoju kaj raviĝu, ĉar via rekompenco estos granda en la ĉielo; ĉar tiel oni persekutis la profetojn, kiuj estis antaŭ vi.
Vi estas la salo de la tero; sed se la salo sengustiĝis, per kio ĝi estos salita? ĝi jam taŭgas por nenio, krom por esti elĵetita kaj piedpremita de homoj.
Vi estas la lumo de la mondo. Urbo starigita sur monto ne povas esti kaŝita.
Kiam oni bruligas lampon, oni metas ĝin ne sub grenmezurilon, sed sur la lampingon; kaj ĝi lumas sur ĉiujn, kiuj estas en la domo.
Tiel same via lumo lumu antaŭ homoj, por ke ili vidu viajn bonajn farojn, kaj gloru vian Patron, kiu estas en la ĉielo.

L : Aŭdu kaj vi vivos.
**K : Ni danku al Dio.**

**Prediko**

## V. Kompromisa gesto esti salo kaj lumo

*La celebranto nun faras ĉi tiun alvokon al la kunveno:*

C : Ni aŭskultis la Sanktajn Skribojn, kiujn ni honoras kaj kiuj estas nia riĉeco,
kaj ni nutriĝis kune ĉe la sama tablo de la Vorto.
Ni prenos kun ni ĉi tiun sanktan Vorton al la mondo
ĉar la sama misio unuigas nin:
ke ni estu salo de la tero, lumo de la mondo,
ke ni proklamu la grandajn farojn de la Sinjoro.

Kiel signo de tiu misio, kiun ni kundividas, ni invitas tiujn, kiuj volos alproksimiĝi, veni provi pinĉaĵon de ĉi salo kaj bruligi malgrandan kandelon je tiu ununura flamo. Ni invitas tiujn, kiuj faros ĉi geston teni la flamon ĝis la fino de la celebro.

## VI. Espero-preĝoj

C : Kiel infanoj de Dio, konsciaj pri nia digno kaj nia misio, ni levu niajn preĝojn, konfirmante nian deziron esti antaŭ Dio popolo sankta.

*Silento*

C : Am inda Patro, transformu nian koron, niajn familiojn, niajn komunumojn kaj nian socion.
**A : Faru ke ni ĉiuj estu sanktuloj kaj unu en Kristo.**

C : Fonto de vivo, kontentigu la soifon, kiun nia socio suferas: soifo de digno, de amo, de komuneco kaj de sankteco
**A : Faru ke ni ĉiuj estu sanktuloj kaj unu en Kristo.**

C : Sankta Spirito, Spirito de ĝojo kaj paco, kuracu la dividojn, kiujn misuzo de povo kaj mono generas en ni, kaj repacigu nin en nia diverseco de kulturoj kaj lingvoj. Kiel infanojn de Dio, plenumu nian unuecon
**K : Faru ke ni ĉiuj estu sanktuloj kaj unu en Kristo.**

C : Triunuo de amo, helpu nin moviĝi el la mallumoj en vian lumon mirindan.
**K : Faru ke ni ĉiuj estu sanktuloj kaj unu en Kristo.**

C : Sinjoro Jesuo Kristo, per la bapto, ni iĝas unu kun vi. Sekve, ni kunligos niajn preĝojn al la via, reprenante la vortojn, kiujn vi mem instruis al ni:

**K : Patro Nia, kiu estas en la ĉielo,**
**sanktigata estu via nomo.**
**Venu via regno.**

**Fariĝu via volo,**
**kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.**
**Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ.**
**Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn,**
**kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj.**
**Kaj ne konduku nin en tenton,**
**sed liberigu nin de la malbono.**

**Ĉar Via estas la regno,**
**kaj la potenco**
**kaj la gloro.**
**Amen.**

## VII. Paco-kundivido

C : Jesuo diris:
Vi estas la salo de la tero.
Vi estas la lumo de la mondo.
Via lumo lumu antaŭ homoj,
por ke ili vidu viajn bonajn farojn, kaj gloru vian Patron,
kiu estas en la ĉielo.
Estu la salo de la tero.
Estu la lumo de la mondo.
La paco de la Sinjoro estu kun vi ĉiam.

K : **Kaj kun via spirito.**

*C : Interŝanĝu reciproke iun pacan signon.*

## VIII. Beno kaj sendado

C : Feliĉaj estas la malriĉaj en spirito.
Feliĉaj estas la plorantaj.
Feliĉaj estas la humilaj.
Feliĉaj estas la kompatemaj.
Feliĉaj estas la kore puraj.
Feliĉaj estas la pacigantoj.
Feliĉaj estas la persekutitaj.
Vi estu benitaj de Dio, Patro, Filo kaj Sankta Spirito.

K : **Amen**.

C : Iru en paco.
K : **Amen**.

## LA BIBLIAJ MEDITOJ KAJ PREĜOJ DUM OK TAGOJ

### LA UNUA TAGO: Derulu la ŝtonon

**Jeĥezkel 37, 12-14**

*Mi malfermos viajn tombojn kaj elirigos vin el viaj tomboj, ho Mia popolo.*

Tial profetu, kaj diru al ili: Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Jen Mi malfermos viajn tombojn kaj elirigos vin el viaj tomboj, ho Mia popolo, kaj Mi venigos vin en la landon de Izrael. Kaj vi ekscios, ke Mi estas la Eternulo, kiam Mi malfermos viajn tombojn kaj elirigos vin el viaj tomboj, ho Mia popolo. Kaj Mi enmetos Mian spiriton en vin, kaj vi reviviĝos, kaj Mi aranĝos vin en via lando; kaj vi ekscios, ke Mi, la Eternulo, tion parolis kaj faris, diras la Eternulo.

**Psalmo 71,18b-23**

*Via forto kaj via justeco, ho Dio, estas pli grandaj ol ĉio.*

Ĝis mi rakontos pri Via brako al la estonta generacio,
Pri Via forto al ĉiuj venontoj.
Via justeco, ho Dio, estas tre alta;
En la grandaj faroj, kiujn Vi plenumis,
Ho Dio, kiu Vin egalas?
Vi vidigis al mi grandajn kaj kruelajn suferojn,
Sed Vi denove min vivigis,
Kaj el la abismoj de la tero Vi denove min eligis.
Vi pliigas mian grandecon
Kaj denove min konsolas.
Kaj mi gloros Vin per psaltero por Via fideleco, ho mia Dio;
Mi kantos al Vi per harpo,
Ho Sanktulo de Izrael!
Ĝojas miaj lipoj, kiam mi kantas al Vi;
Kaj mia animo, kiun Vi savis.

**Romanoj 8,15-21**

*Ni suferas kun li, por ke ni estu glorataj kun li.*

Ĉar vi ne ricevis la spiriton de sklaveco denove al timo; sed vi ricevis la spiriton de adopto, per kiu ni krias: Aba, Patro. La Spirito mem kunatestas kun nia spirito, ke ni estas idoj de Dio; kaj se idoj, tial heredantoj, heredantoj de Dio, kunheredantoj kun Kristo, se vere ni suferas kun li, por ke ni estu glorataj kun li. Ĉar mi kalkulas, ke la suferoj de la nuna tempo ne indas komparon kun la gloro, kiu estas malkaŝota al ni. Ĉar la fervora sopiro de la kreitaro atendas la malkaŝon de la filoj de Dio. Ĉar la kreitaro subiĝis sub la vanecon, ne volonte, sed, pro la subiganto, kun espero, ke

la kreitaro mem ankaŭ liberiĝos el la sklaveco de pereo en la liberecon de la gloro de la idoj de Dio.

**Mateo 28,1-10**
*Li ne estas ĉi tie; ĉar li leviĝis, kiel li diris.*

Kaj sabate malfrue, kiam eklumis por la unua tago de la semajno, venis Maria Magdalena kaj la alia Maria, por vidi la tombon. Kaj jen okazis granda tertremo; ĉar anĝelo de la Eternulo malsupreniris el la ĉielo, kaj venis kaj derulis la ŝtonon, kaj sidiĝis sur ĝi. Lia aspekto estis kiel fulmo, kaj lia vestaĵo estis blanka, kiel neĝo; kaj pro timo al li la gardistoj tremis, kaj fariĝis kiel malvivuloj. Kaj la anĝelo responde diris al la virinoj: Ne timu; ĉar mi scias, ke vi serĉas Jesuon, la krucumitan. Li ne estas ĉi tie; ĉar li leviĝis, kiel li diris. Venu, vidu la lokon, kie la Sinjoro kuŝis. Kaj iru rapide, kaj diru al liaj disĉiploj: Li leviĝis el la mortintoj, kaj jen li iras antaŭ vi en Galileon; tie vi vidos lin; jen mi sciigis al vi. Kaj ili rapide foriris de la tombo kun timo kaj granda ĝojo, kaj kuris, por sciigi al liaj disĉiploj. Kaj jen Jesuo renkontis ilin, dirante: Saluton. Kaj alveninte, ili ekprenis liajn piedojn kaj adorkliniĝis al li. Tiam Jesuo diris al ili: Ne timu; iru, diru al miaj fratoj, ke ili foriru en Galileon, kaj tie ili min vidos.

**KOMENTO**
La hodiaŭan meditadon preparis la Katolika porjunulara centro de la ĉefdiocezo Rigo. Ĝi eblis pro la spertoj faritaj dum la organizo de ekumena krucvojo, kiu ĉiun jaron denove estas gravega ekumena okazo en Latvio. Tiaj spertoj invitas je meditado pri la signifo kiun pasiono kaj resurekto havas por Latvio kaj kiaj estas la grandaj faroj de la Sinjoro kiujn la kristanoj devas publike anonci.
* La sovetia pasinteco daŭre kuŝas ombre super la latva popolo. Daŭras la tristeco, la doloro kaj la vundoj malfacile pardoneblaj. Ĉio tia estas kiel la ŝtonego blokinta la aliron al la tombo de Jesuo. Kun tiaj vundoj ni kuŝas kvazaŭ en spirita tombo.
* Sed se niaj propraj doloroj ensufere unuiĝintaj estas kun la doloro de Jesuo, la historio ne finiĝos tie ĉi - kaj ni ne restos fermitaj en niaj tomboj. La tertremo de la leviĝo de la Sinjoro estas la skuanta okazo kiu malfermas niajn tombojn kaj liberigas nin de doloro kaj amaro separantaj la homojn.
* Tia estas la granda faro de la Sinjoro: lia amo, kiu tremigas la mondon, kiu derulas la ŝtonojn, kiu liberas nin kaj vokas nin en la matenon de nova tago. Je la ektagiĝo ni estos unuigitaj kun niaj gefratoj kiuj same estis tenitaj en kaptitejo kaj estis suferintaj. Kaj kiel Maria Magdalena ni devas post tiu momento de ĝojo „ekkuri“ kaj rakonti al aliaj kion faris la Sinjoro (kp. Mateo 28,7-8).

**DEMANDOJ POR LA PERSONA PRIMEDITO**
* Kiuj eventoj kaj cirkonstancoj en nia vivo igas nin enfermi nin entombe – kun funebro, zorgo, timo, malespero? Kio malhelpas nin akcepti la promeson kaj la ĝojon de la resurekto de Kristo?
* Ĉu ni estas pretaj rakonti al homoj, kiuj renkontas nin survoje, pri niaj spertoj kun Dio?

**PREĜO**
Sinjoro Jesuo Kristo, vi amas nin ekde la komenco de la mondo. Vi montris al ni la profundecon de via amo, kiu mortis por ni surkruce kaj transprenis doloron kaj vundojn niajn. Nun ni metu ĉion, kio separas nin de via amo, ĉe vian krucon. Derulu la ŝtonojn, kiuj faris nin prizonuloj. Veku nin por via resurektomateno, por ke ni ekkonu ilin kiel fratojn kaj fratinojn, kiuj ankoraŭ estas de ni separitaj. Amen.

## LA DUA TAGO: Vokitaj esti perantoj de espero

### Jesaja 61, 1-4

*La spirito de la Sinjoro, la Eternulo, estas sur mi;*
*Li sendis min por bonanonci al mizeruloj*

La spirito de la Sinjoro, la Eternulo, estas sur mi, ĉar la Eternulo min sanktoleis, por bonanonci al mizeruloj; Li sendis min, por bandaĝi tiujn, kies koro estas vundita, por anonci liberecon al kaptitoj kaj malŝloson al malliberigitoj, por proklami favorjaron de la Eternulo kaj venĝotagon de nia Dio, por konsoli ĉiujn malĝojulojn, por fari al la afliktitoj de Cion, ke oni donu al ili ornamon anstataŭ cindro, oleon de ĝojo anstataŭ funebro, veston de gloro anstataŭ spirito afliktita, kaj ke oni nomu ilin kverkoj de justeco, plantaĵo de la Eternulo por Lia gloro. Kaj ili rekonstruos la antikvajn ruinojn, restarigos la detruitaĵojn de la antaŭa tempo, kaj renovigos la ruinigitajn urbojn, dezertigitajn antaŭ multe da generacioj.

### Psalmo 133

*Jen, kiel bone kaj ĉarme estas,*
*se la fratoj vivas kune*

Jen, kiel bone kaj ĉarme estas,
Se fratoj vivas kune!
    Kiel la bona oleo,
    Kiu de la kapo defluas sur la barbon, la barbon de Aaron,
    Kaj defluas sur la randon de lia vesto;
Kiel la roso, Kiu de Ĥermon malleviĝas sur la montojn de Cion;
Ĉar tie la Eternulo donas la benon, Vivon por eterne.

### Filipianoj 2, 1-5

*[…] plenigu mian ĝojon, ke vi kiel same sentu, havante la saman amon, estante unanimaj sampensaj!*

Se do en Kristo ekzistas ia konsolo, ia simpatio de amo, ia kunuleco de la Spirito, ia korfavoro kaj kompato, plenigu mian ĝojon, ke vi tiel same sentu, havante la saman amon, estante unuanimaj, sampensaj, nenion farante malpace aŭ arogante, sed kun humileco rigardante unu la alian kiel pli indan, ol li mem; ne atentu ĉiu siajn

proprajn aferojn, sed ĉiu ankaŭ la aferojn de aliaj. Tiu sama spirito estu en vi, kiu estis ankaŭ en Kristo Jesuo.

**Johano 15, 9-12**
*Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena*

Kiel la Patro min amis, tiel mi ankaŭ vin amis; restadu en mia amo. Se vi observos miajn ordonojn, vi restados en mia amo tiel same, kiel mi observis la ordonojn de mia Patro kaj restadas en Lia amo. Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena. Jen estas mia ordono: ke vi amu unu alian tiel same, kiel mi vin amis.

**KOMENTO**
En sovetunia tempo, en Latvio ne eblis kristanaĵoj en la maskomunikiloj. Post la sendependeco, la ŝtata latva radio ekdissendis kristanajn programojn pri unueco kaj pri misio, havigis forumon por la ĉefoj de la diversaj eklezioj, kie ili povis renkontiĝi. Tiu publika atesto de reciproka respekto, de amo kaj de ĝojo kontribuis formi la fizionomion de la latva ekumena vivo. La hodiaŭa medito inspiriĝas el la travivaĵo de la kreintoj de tiuj kristanaj programoj ĉe la ŝtata latva radio.
* La ĝojo de la evangelio vokas la kristanojn travivi la profetaĵon de Jesaja: „La spirito de la Sinjoro, la Eternulo, estas sur mi; li sendis min por bonanonci al mizeruloj“. Ni atendas trepide la evangelion, kiu sanigos niajn dividitajn korojn kaj liberigos de ĉio, kio ligas kaj enprizonigas nin.
* Kiam ni estas malĝojaj, trafitaj de niaj suferadoj, ni povas malpliigi la necesan forton por proklami la ĝojon el Jesuo. Malgraŭ tio, ankaŭ kiam ni ne sentas nin kapablaj doni, per nia malmulto Jesuo multobligas ĝin por ni kaj por la aliuloj.
* En la Evangelio Jesuo diras: „Kiel la Patro min amis, tiel mi ankaŭ vin amis; por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena“. Tiamaniere ni malkovras la ĝojon en ni, tiel nia ĝojo estu plena. La ĝojo kaj la reciproka amo estas en la koro de nia preĝo por la kristana unueco. Kiel skribas la psalmisto: „Jen, kiel bone kaj ĉarme estas, se la fratoj vivas kune!“.

**DEMANDOJ POR LA PERSONA PRIMEDITO**
* Kio malfortigas la ĝojon en la mondo kaj en la eklezioj?
* Kion oni povas ricevi el la aliaj kristanoj, por ke la ĝoĵo de Jesuo estu en ni kaj farigas nin atestantoj de la Evangelio?

## PREĜO

Ho, Dio de amo, rigardu je nia volo servi, malgraŭ nia spirita malriĉeco kaj niaj limigitaj kapabloj. Plenigu la plej profundan deziron en niaj koroj per via ĉeesto. Plenigu niajn dispremitajn korojn per via saniga amo, tiel ke ni kapablu ami kiel Vi amis. Donu al ni la unuecon, tiel ni povas servi Vin ĝoje kaj kundividi vian amon kun ĉiuj estuloj. Ni petas de Vi tion per la nomo de via Filo Jesuo Kristo. Amen.

## LA TRIA TAGO: Frateca atesto

**Jeremia 31, 10-13**
*Ili venos kaj kantos sur la altaĵo de Cion.*

Aŭskultu la vorton de la Eternulo, ho nacioj, kaj sciigu al la malproksimaj insuloj, kaj diru: La disĵetinto de Izrael kolektos lin kaj gardos lin, kiel paŝtanto sian paŝtataron. Ĉar la Eternulo elaĉetis Jakobon kaj liberigis lin el la mano de plifortulo. Kaj ili venos kaj kantos sur la altaĵo de Cion; kaj ili rapidos al la bonaĵoj de la Eternulo, al la greno, al la mosto, al la oleo, al la ŝafidoj kaj bovidoj; kaj ilia animo estos kiel akvoriĉa ĝardeno, kaj ili ne plu havos malĝojon. Tiam virgulino gajos en la dancrondo, kaj kune ankaŭ junuloj kaj maljunuloj; kaj Mi ŝanĝos ilian malĝojon en ĝojon, Mi konsolos ilin kaj gajigos ilin post ilia aflikto.

**Psalmo 122,1-9**
*Deziru pacon al Jerusalem; bonan staton havu viaj amantoj.*

Mi ekĝojis, kiam oni diris al mi:
Ni iru en la domon de la Eternulo.
    Niaj piedoj staris en viaj pordegoj,
    Ho Jerusalem,
    Vi Jerusalem, konstruita kiel urbo,
    En kiu ĉio kuniĝis.
Tien supreniris la triboj, la triboj de la Eternulo,
Laŭ la moro de Izrael,
Por glori la nomon de la Eternulo.
    Ĉar tie staris tronoj de juĝo,
    Tronoj de la domo de David.
Deziru pacon al Jerusalem;
Bonan staton havu viaj amantoj.
    Paco estu inter viaj muroj,
    Bonstato en viaj palacoj.
Pro miaj fratoj kaj amikoj mi do diru:
Paco estu al vi.
    Pro la domo de la Eternulo, nia Dio,
    Mi deziras al vi bonon.

**1 Johano 4,16-21**
*Se iu diras: Mi amas Dion, kaj malamas sian fraton - tiu estas mensoganto.*

Kaj ni konas kaj kredis la amon, kiun Dio havas al ni. Dio estas amo; kaj kiu restas en amo, tiu restas en Dio, kaj Dio restas en li. Jen kiel amo perfektiĝis ĉe ni: ke ni havu kuraĝon en la tago de juĝo; ĉar ĝuste kia li estas, tiaj ankaŭ ni estas en ĉi tiu mondo. Timo ne ekzistas en amo; sed perfekta amo elĵetas timon, ĉar timo havas turmentegon; kaj timanto ne perfektiĝas en amo. Ni amas, ĉar Li unue nin amis. Se

iu diras: Mi amas Dion, kaj malamas sian fraton – tiu estas mensoganto; ĉar kiu ne amas sian fraton, kiun li vidis, tiu ne povas ami Dion, kiun li ne vidis. Kaj la jenan ordonon ni havas de Li: ke kiu amas Dion, tiu amu ankaŭ sian fraton.

**Johano 17, 20-23**
*Por ke ili perfektiĝu en unu; por ke la mondo sciu, ke Vi min sendis, kaj ke Vi ilin amis, kiel Vi min amis.*

Kaj mi preĝas ne nur por ili, sed ankaŭ por tiuj, kiuj kredos al mi pro ilia vorto; por ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kredu, ke Vi min sendis. Kaj la gloron, kiun Vi donis al mi, mi donis al ili; por ke ili estu unu tiel same, kiel ni estas unu; mi en ili, kaj Vi en mi, por ke ili perfektiĝu en unu; por ke la mondo sciu, ke Vi min sendis, kaj ke Vi ilin amis, kiel Vi min amis.

**KOMENTO**
„Chemin Neuf“, internacia katolika komunumo kun ekumena alvokiteco, estas enradikigita en Latvio jam de pli ol dek jaroj per la kunesto de katolikaj kaj luteranaj membroj. Ili kune spertas la ĝojon, kiun alportas la frateco en Kristo, kaj la suferon de la divideco.
Kiel signon de tiu divideco, ĉe ĉiu vespera preĝo, ili metas malplenajn patenon kaj kalikon sur la altaron. Tio, kion ili travivis, inspiris al ili tiun pripensaĵon.
* La dividoj inter kristanoj kontraŭas la evangelizadon. La mondo ne povas kredi, ke ni estas disĉiploj de Jesuo, tiel longe, kiel nia reciproka amo estas nekompleta. Ni spertas la suferon de tiu divido, ne povante kune ricevi la korpon kaj la sangon de Kristo, ĉe la Eŭkaristio, sakramento de la unueco.
* La fonto de nia ĝojo estas nia komuna vivo en Kristo. Nia ĉiutaga frateca vivo konsistas en tio, ke ni bonvenigas, amas, servas, preĝas kaj atestas kun malsamtradiciaj kristanoj. Tio estas la multvalora perlo, kiun la Sankta Spirito donacis al ni.
* Dum la nokto antaŭ sia morto, Jesuo preĝis, por ke ni estu unu, kaj ke ni amu unu la alian. Hodiaŭ ni levas la manojn por preĝi kun li por la kristana unueco. Ni preĝas por la episkopoj, la servantoj kaj membroj de ĉiuj Eklezioj. Ni preĝas, por ke la Sankta Spirito nin gvidu sur tiu vojo al unueco.

**DEMANDOJ POR LA PERSONA PRIMEDITO**
* Kiel ni taksas la kristanojn de aliaj Eklezioj ? Ĉu ni estas pretaj pardonpeti pro niaj antaŭjuĝoj kontraŭ ili?
* Kion ĉiu el ni povas fari, por ke la dividoj inter kristanoj malkresku?

**PREĜO**
Sinjoro Jesuo, vi, kiu preĝis, por ke ni estu unu, ni preĝas al vi, por ke vi konsentu al ni la donacon de la unueco tia, kia vi ĝin volas, per la rimedoj, kiujn vi volas. Via Spirito donu al ni, ke ni spertu la suferon de disiĝo, vidu nian pekon kaj esperu transe de ĉia espero. Amen.

# LA KVARA TAGO:

## Genezo 17,1-8 Pastra popolo vokata prediki la evangelion

*Via nomo ne estos plu Abram, sed via nomo estos Abraham, ĉar Mi faris patron de multe da popoloj.*

Kiam Abram havis la aĝon de naŭdek naŭ jaroj, aperis la Eternulo al Abram, kaj diris al li: Mi estas Dio la Plejpotenca; iradu antaŭ Mi kaj estu senpeka.
Kaj Mi faros Mian interligon inter Mi kaj vi, kaj Mi multigos vin tre forte.
Kaj Abram ĵetis sin vizaĝaltere, kaj Dio parolis al li, dirante: Jen estas Mia interligo kun vi: vi estos patro de multe da popoloj. Kaj via nomo ne estos plu Abram, sed via nomo estos Abraham, ĉar Mi faris vin patro de multe da popoloj.
Kaj Mi fruktigos vin tre multe, kaj Mi devenigos de vi popolojn, kaj reĝoj devenos de vi.
Kaj Mi starigos Mian interligon inter Mi kaj vi kaj via idaro post vi en iliaj generacioj, eternan interligon, ke Mi estos Dio por vi kaj por via idaro post vi.
Kaj Mi donos al vi kaj al via idaro post vi la landon, en kiu vi loĝas kiel fremdulo, la tutan landon Kanaanan, por eterna posedaĵo, kaj Mi estos Dio por ili.

## Psalmo 148,8-12

*Kompatema kaj favorkora estas la Eternulo, longetolera kaj kun granda boneco.*

Fulmo kaj hajlo, neĝo kaj nebulo,
Ventego, kiu plenumas Lian vorton;
        Montoj kaj ĉiuj montetoj,
        Fruktoportaj arboj kaj ĉiuj cedroj;
Bestoj kaj ĉiaj brutoj,
Rampaĵoj kaj flugilaj birdoj;
        Reĝoj de la tero kaj ĉiuj popoloj,
        Princoj kaj ĉiuj juĝantoj sur la tero;
Junuloj kaj junulinoj,
Maljunuloj kaj knaboj.

## Romanoj 10,14-15

*Kiel ili kredos al Tiu, pri kiu ili ne aŭdis?*

Kiel do ili vokos Tiun, al kiu ili ne kredis?
Kaj kiel ili kredos al Tiu, pri kiu ili ne aŭdis?
Kaj kiel ili aŭdos sen predikanto?
Kaj kiel oni predikos, se ili ne estos senditaj?
Kiel estas skribite: Kiel ĉarmaj
estas la piedoj de la anoncantoj de la evangelio de bono!

**Mateo 13,3-9**
*Kaj aliaj falis sur la bonan teron, kaj donis frukton, jen centoble, jen sesdekoble, jen tridekoble.*

Kaj li multe parolis al ili per paraboloj, dirante:
Jen semisto eliris, por semi; kaj dum li semis, iuj semoj falis apud la vojo, kaj la birdoj venis kaj formanĝis ilin; kaj aliaj falis sur ŝtonajn lokojn, kie ili ne havis multe da tero; kaj tuj ili ekkreskis, ĉar ili ne havis profundecon de tero; kaj kiam la suno leviĝis, ili brulsekiĝis, kaj ĉar ili ne havis radikon, ili forvelkis. Kaj aliaj falis inter dornojn, kaj la dornoj kreskis kaj sufokis ilin; kaj aliaj falis sur la bonan teron, kaj donis frukton, jen centoble, jen sesdekoble, jen tridekoble. Kiu havas orelojn, tiu aŭdu.

**KOMENTO**
Ĉi-tiu meditado reflektas la sperton de la aŭtoroj de la kristana elsendo „Vertikale", dissendata ĉiun dimanĉon antaŭtagmeze.
La defio konservi tiun kristanan voĉon en la ŝtata televido de Latvio montris al ili, ke ni nur povas kuraĝi prediki la Parolon de Dio publike, se ni respektas aliajn kristanojn kiel gefratojn.
* Vortoj inundas niajn hejmojn hodiaŭ, pli ol antaŭe: ne nur vortoj el niaj konversacioj, sed ankaŭ vortoj el la televido, la radio kaj la sociaj komunikiloj. Tiuj vortoj havas la potencon edifi aŭ deprimi nin. Tiu oceano de vortoj ofte ŝajnas esti sensenca – distra anstataŭ nutroriĉa por nia spirito.
* Oni povus droni en tia oceano kiu estas sen firmecodonanta senco. Sed ni aŭdis liberigantan parolon, kiu estis ĵetita al ni kiel savoringo.
Tiu parolo vokas nin al la komuneco kaj unueco kun alioj, kiuj same aŭdis ĝin. Antaŭe ni ne estis popolon, sed nun ni estas la popolo de Dio.
* Ne nur tio: Ni estas pastra popolo. Ni estas en unu komunumo kun aliaj, kiu aŭdis la Dian Parolon kiel ni. Tielmaniere niaj vortoj ne plu estas kiel gutoj perdiĝantaj sin en la oceano. Ni havas potencan parolon por prediki. En komuneco ni povas elparoli ĝin kun aŭtoritato: Jeshua – Dio savas.

**DEMANDOJ POR LA PERSONA PRIMEDITO**
* Ĉu nia predikado estas mallumigata kaŭze de ambicio, konkurencemo, envio aŭ antaŭjuĝoj kontraŭ aliaj kristanoj?
* Kiu aŭdas de ni la vivigantan Parolon de Dio?

**PREĜO**
Sinjoro Jesuo Kristo, vi diris ke ĉiuj ekkonos, ke ni estas viaj disĉiploj, se ni amas nin. Fortigu nin per via graco, por ke ni nelacigeble engaĝiĝu por la videbla unueco de via eklezio. Tiam oni ekkonos la Bonan Mesaĝon el ĉiuj niaj vortoj kaj faroj, ĉar ni ja estas vokataj prediki tion. Amen.

## LA KVINA TAGO: Kunuleco de la apostoloj

### Jesaja 56,6-8

*Ĉar mia domo estos nomata preĝejo por ĉiuj popoloj.*

Kaj la fremdulojn, kiuj aliĝis al la Eternulo, por servi al Li kaj ami la nomon de la Eternulo, por esti Liaj sklavoj, ĉiujn, kiuj observas sabaton, por ne malsanktigi ĝin, kaj kiuj tenas sin je Mia interligo, Mi venigos sur Mian sanktan monton kaj ĝojigos en Mia preĝejo; iliaj bruloferoj kaj buĉoferoj estos favore akceptataj sur Mia altaro; ĉar Mia domo estos nomata preĝejo por ĉiuj popoloj. La Sinjoro, la Eternulo, kiu kolektas la dispelitojn de Izrael, diras: Al liaj kolektitoj Mi kolektos ankoraŭ pli.

### Psalmo 24,1-10

*Kiu supreniros sur la monton de la Eternulo?*

Al la Eternulo apartenas la tero, kaj ĉio, kio ĝin plenigas,
La mondo kaj ĉiuj ĝiaj loĝantoj.
Ĉar Li sur la maroj ĝin fondis
Kaj sur la akvoj ĝin fortikigis.
    Kiu supreniros sur la monton de la Eternulo?
    Kaj kiu staros ĉe Lia sankta loko?
    Tiu, kiu havas purajn manojn kaj senmakulan koron,
    Kiu ne fordonis sian animon al malvero
    Kaj ne ĵuras trompe.
Li ricevos benon de la Eternulo,
Kaj bonfarojn de Dio, lia savanto.
Tio estas la gento de Liaj adorantoj,
De la serĉantoj de Via vizaĝo, ho Dio de Jakob.
    Levu, pordegoj, viajn kapojn;
    Kaj leviĝu, pordoj antikvaj,
    Por ke eniru la Reĝo de gloro.
Kiu estas tiu Reĝo de gloro?
La Eternulo forta kaj potenca,
La Eternulo, la potenculo de milito.
    Levu, pordegoj, viajn kapojn;
    Kaj leviĝu, pordoj antikvaj,
    Por ke eniru la Reĝo de gloro.
Kiu estas tiu Reĝo de gloro?
La Eternulo Cebaot,
Li estas la Reĝo de gloro.

### Agoj 2,37-42

*Kaj ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj.*

Kaj aŭdinte tion, ili estis pikitaj en la koro, kaj diris al Petro kaj la aliaj apostoloj: Kion ni faru, fratoj? Kaj Petro diris al ili: Ekpentu, kaj baptiĝu ĉiu el vi en la nomo de Jesuo Kristo por forigo de pekoj, kaj vi ricevos la donacon de la Sankta Spirito.

Ĉar la promeso estas por vi kaj por viaj infanoj, kaj por ĉiuj ĝis malproksime, kiujn alvokos la Eternulo, nia Dio. Kaj per multaj aliaj paroloj li atestis kaj alvokis ilin, dirante: Savu vin el ĉi tiu perversa generacio. Tiuj do, kiuj akceptis lian parolon, baptiĝis, kaj en tiu tago aldoniĝis ĉirkaŭ tri mil animoj. Kaj ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj.

**Johano 13,34-35**
*Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian.*

Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu alian. Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al alia.

## KOMENTO

La kunuleco de kristanaj gvidantoj formas la videblan esprimon de ekumena vivo en Latvio. Ili regule renkontiĝas sur Gaizins, la plej alta monto de Latvio, kaj en aliaj lokoj por 40-hora tempo de preĝado kaj simpla kunuleco ĉirkaŭ la kundividitaj manĝaĵoj. Ĉi tiuj renkontiĝoj renovigas la gvidantojn kiel kunlaborantojn en Kristo. La sperto de la fondinto de latva eklezio por ĉiuj popoloj inspiris ĉi tiun enpensiĝon.
* La ordono de Jesuo ami unu la alian ne estas teoria. Nia komunumo de reciproka amo konkretiĝas, kiam ni intence renkontiĝas kiel disĉiploj de Kristo por kunuleco kaj preĝado en la povo de la Spirito.
* Ju pli kristanoj, ĉefe iliaj gvidantoj, renkontiĝas kun Kristo en humileco kaj pacienco, des pli antaŭjuĝoj malaperas, des pli ni malkovras Kriston en aliaj personoj kaj des pli ni iĝas aŭtentikaj atestantoj pri la Dia regno.
* De tempo al tempo ekumenismo povas esti tre komplika. Sed ĝojplena kunuleco, kundividita manĝaĵo kaj komuna preĝado kaj adorado estas manieroj de apostola simpleco. Tiamaniere ni obeas la ordonon ami unu la alian kaj ni diras Amen al preĝo de Kristo por unueco.

## DEMANDOJ POR LA PERSONA PRIMEDITO

* Kia estas nia sperto de renkontiĝado kiel gefratoj en Kristo per kristana kunuleco, kundividitaj manĝaĵoj kaj komuna preĝado?
* Kion ni atendas de episkopoj kaj aliaj ekleziaj gvidantoj survoje al videbla unueco de la Eklezio? Kiel ni povas subteni kaj kuraĝigi ilin?

## PREĜO

Dio de nia Sinjoro Jesuo Kristo, la Patro de gloro, donu al ĉiuj kristanoj kaj precipe al gvidantoj en via Eklezio spiriton de saĝeco kaj revelacio, por ke per okuloj de niaj koroj ni povu vidi esperon, al kiu vi vokis nin: unu korpo kaj unu Spirito, unu Sinjoro, unu kredo, unu bapto, unu Dio kaj Patro de ĉiuj, kiu estas supre kaj per ĉio kaj en ĉio. Amen.

## LA SESA TAGO: Aŭskultu tiun ĉi sonĝon

**Genezo 37, 5-8**
*Aŭskultu la sonĝon kiun mi sonĝis.*

Jozef havis sonĝon, kaj li rakontis ĝin al siaj fratoj; tiam ili ekmalamis lin ankoraŭ pli. Li diris al ili: Aŭskultu la sonĝon, kiun mi sonĝis: ni ligis garbojn meze de la kampo; kaj jen mia garbo stariĝis kaj restis starante, kaj viaj garboj ĝin ĉirkaŭis kaj profunde kliniĝis antaŭ mia garbo. Tiam liaj fratoj diris al li: Ĉu vi estos reĝo super ni? Aŭ ĉu vi regos super ni? Kaj ili ankoraŭ pli ekmalamis lin pro liaj sonĝoj kaj pro liaj vortoj.

**Psalmo 126**
*Ŝajnis al ni sonĝi.*

Kiam la Eternulo revenigis la forkaptitojn al Cion,
Tiam ni estis kiel sonĝantoj.
    Tiam nia buŝo estis plena de gajeco,
    Kaj nia lango plena de kantado;
    Tiam oni diris inter la popoloj:
    Ion grandan la Eternulo faris por ĉi tiuj.
    Ion grandan la Eternulo faris por ni:
    Ni ĝojas.
Revenigu, ho Eternulo, niajn forkaptitojn,
Kiel riveretojn en sudan landon.
Kiuj semas kun larmoj,
Tiuj rikoltos kun kanto.
Iras kaj ploras la portanto de semotaĵo;
Venos kun kanto la portanto de siaj garboj.

**Romanoj 12,9-13**
*Amu vin reciproke, kiel gefratoj. Estu zorgemaj, estimante vin unu la alian.*

Via amo estu sen hipokriteco. Abomenu tion, kio estas malbona; algluiĝu al la bona. En fratamo estu kore unuigitaj unu al alia, honore preferantaj unu la alian; en diligenteco ne malviglaj, en spirito fervoraj, servantaj la Sinjoron; en espero ĝojaj, en aflikto paciencaj, en preĝado persistaj; kotizantaj por la bezonoj de la sanktuloj, sekvantaj gastamecon.

**Johano 21,25**
*Mi pensas ke eĉ la tuta mondo ne povus enhavi ilin.*

Estas ankaŭ multaj aliaj faroj, kiujn Jesuo faris; kaj mi supozas, ke se ĉiu el ili estus skribita detale, la tuta mondo ne havus lokon por la skribotaj libroj.

**KOMENTO**
La disiĝo inter kristanoj vundas. La Eklezioj suferadas pro sia nekapablo esti unuiĝintaj, kiel ununura familio ĉirkaŭ la manĝotablo de la Sinjoro; ili suferadas pro la rivalecoj kaj pro historio plena je streĉiteco. Ia individua respondo al la disiĝo estas donita en la jaro 2005, sub la aspekto de ekumena gazeto: Kas Mus Vieno? (Kio nin kunigas?). La sperto realigita de tiu ĉi gazeto inspiris la hodiaŭ primediton.
* Jozefo faras sonĝon, kiu estas dia mesaĝo. Tamen, kiam Jozefo rakontas la sonĝon al siaj fratoj, ili reagas kun kolero kaj perforto, ĉar en la sonĝo ili devas submetiĝi al li. Fine la malsato kondukas la fratojn al Egiptujo, kaj ili efektive submetiĝas al Jozefo, sed anstataŭ humiliĝo kaj malhonoro kiujn ili timis, ili trovas momenton de repaciĝo kaj paco.
* Jesuo, kiel Jozefo, revelacias al ni vizion, mesaĝon pri la vivo en la regno de sia Patro. Ĝi estas vizio de unueco, sed, kiel la fratoj de Jozefo, ankaŭ ni ofte estas ĝenitaj, koleraj kaj timigitaj de tio kion la vizio kuntrenas. Ĝi petas de ni akcepton kaj submetiĝon al la Dia volo. Ĝi timigas nin, ĉar ni timas tion, kion ni povus perdi. Sed la vizio ne implicas perdon, ĝi estas prefere retroviĝo kun la fratoj kiujn ni perdis, estas reunuigi la familion.
* Oni verkis tiom da ekumenaj tekstoj, sed la vizio de la unueco de la Eklezio ne estas nur registrita en la tekstoj, kiom ajn gravaj ili estas. La unueco kiun Dio deziras por ni, la vizio kiun li metas antaŭ ni, superas ege ĉion tion, kio povas esti esprimita per vortoj aŭ entenita en libroj. La vizio devas enkorpiĝi en nian vivon, en la preĝadon kaj en la mision, kiun ni kunpartigas kun niaj gefratoj. Pli ol en ĉiu alia afero, ĝi esprimiĝas en la amo kiun ni montras unu al la alia.

**DEMANDOJ POR LA PERSONA PRIMEDITO**
* Kion signifas meti niajn revojn por la unueco de la kristanoj ĉe la piedojn de la Krista Kruco?
* Kiamaniere la vizio de humileco de la Sinjoro instigas hodiaŭ la Ekleziojn al renoviĝo kaj ŝanĝiĝo?

**PREĜO**
Ho, Ĉiela Patro, donacu al ni la humilecon aŭskulti vian voĉon, akcepti vian vokon, kaj kunpartigi vian revon de unueco por la Eklezio. Helpu nin esti konsciaj pri la doloro de la malpaco. Kiam ajn la disiĝo faris nin ŝtonkoraj, agu tiel ke Via Sankta Spirito blovu en niajn korojn, kaj inspiru al ni la vizion esti unuo en Kristo, tiel kiel li estas ununura aĵo kun vi, por ke la mondo kredu ke Vi sendis Lin. Ni petas ĝin de Vi, en la nomo de Kristo nia Sinjoro. Amen.

## LA SEPA TAGO: Gastemo per la preĝo

**Jesaja 62, 6-7**
*Sur viaj muregoj, ho Jerusalem, Mi starigis gardistojn, por ke la tutan tagon kaj la tutan nokton ili ne eksilentu*

Sur viaj muregoj, ho Jerusalem, Mi starigis gardistojn, por ke la tutan tagon kaj la tutan nokton ili ne eksilentu; vi, kiuj memorigas pri la Eternulo, ne faru al vi ripozon, kaj al Li ne donu ripozon, ĝis Li aranĝos kaj faros Jerusalemon gloro sur la tero.

**Psalmo 100**
*Ĝoje kriu al la Eternulo la tuta tero! Servu al la Eternulo kun ĝojo,*

Ĝoje kriu al la Eternulo la tuta tero!
Servu al la Eternulo kun ĝojo,
Venu antaŭ Lian vizaĝon kun kanto.
Sciu, ke la Eternulo estas Dio;
Li nin kreis, kaj al Li ni apartenas,
Lia popolo kaj ŝafoj de Lia paŝtejo.
Eniru en Liajn pordegojn kun dankado,
En Liajn kortojn kun laŭdado.
Gloru Lin, benu Lian nomon;
Ĉar la Eternulo estas bona;
Lia favorkoreco estas eterna,
Kaj de generacio al generacio daŭras Lia fideleco.

**1 Petro 4, 7b-10**
*Prudentiĝu do, kaj sobriĝu por preĝoj*

Prudentiĝu do, kaj sobriĝu por preĝoj; antaŭ ĉio havante fervoran amon unu al alia; ĉar amo kovras amason da pekoj; estu gastamaj unu al alia sen murmurado; laŭmezure, kiel ĉiu ricevis donacon, tiel ĝin administrante inter vi, kiel bonaj administrantoj de la diversaspeca graco de Dio.

**Johano 4, 4-14**
*La akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo*

Kaj li devis trairi tra Samario. Li alvenis do al unu urbo Samaria, nomata Siĥar, apud la terpeco, kiun Jakob donis al sia filo Jozef; kaj la fonto de Jakob estis tie. Jesuo do, lacigita de sia vojirado, sidiĝis tiamaniere apud la fonto.
Estis ĉirkaŭ la sesa horo. Venis virino Samaria, por ĉerpi akvon; Jesuo diris al ŝi: Donu al mi trinki. Ĉar liaj disĉiploj jam foriris en la urbon, por aĉeti nutraĵojn.
La Samarianino do diris al li: Kiel vi, estante Judo, petas trinki de mi, kiu estas Samarianino? (Ĉar la Judoj ne interrilatas kun la Samarianoj.) Jesuo respondis kaj

diris al ŝi: Se vi scius la donacon de Dio, kaj kiu estas tiu, kiu diras al vi: Donu al mi trinki, vi petus lin, kaj li donus al vi vivan akvon.
La virino diris al li: Sinjoro, vi nenian ĉerpilon havas, kaj la puto estas profunda; de kie do vi havas tiun vivan akvon? Ĉu vi estas pli granda ol nia patro Jakob, kiu donis al ni la puton, kaj trinkis mem el ĝi, kiel ankaŭ liaj filoj kaj liaj brutoj?
Jesuo respondis kaj diris al ŝi: Ĉiu, kiu trinkas el ĉi tiu akvo, denove soifos; sed kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo.

**KOMENTO**
La sperto de komuna preĝado dum ĉiu el ok tagoj de la Semajno de Preĝoj por kristana unueco helpis al kristanojn el malgranda latva urbo Madona aliĝi al la amikeco. Konkreta rezulto estis la malfermo de ekumena preĝa kapelo en la urbocentro, konstruita surbaze de elementoj de luterana, katolika kaj ortodoksa tradicioj. Ĉi tie kristanoj de Madona kuniĝas en preĝo dum la tuta tago. Tiu sperto formas la fonon de sekvaj konsideroj.
* Ĝis kiam la popolo de Dio estas separita kaj kristanoj estas apartigitaj unuj disde aliaj, kiel Jesuo en Samario ni estas fremdaj ne en propra lando, senigitaj je protekto, reakiro de la fortoj kaj ripozo.
* La popolo de Izraelo sopiris pri sekura loko kie ĝi povus adori la Sinjoron. Jesaja diras al ni pri la grandaj faroj de la Sinjoro: Li metis gardistojn sur la muroj de Jerusalemo por ke Lia popolo povu sekure adori Lin tage kaj nokte.
* Dum ĉi Semajno de preĝoj niaj preĝejoj kaj kapeloj devas fariĝi sekuraj gastejoj, lokoj de ripozo kaj reakiro de la fortoj por personoj, kiuj kuniĝas en la preĝo. La tasko de ĉi tiu Semajno estas krei pli da lokoj de komuna preĝado.

**DEMANDOJ POR LA PERSONA PRIMEDITO**
* Kiel ni povas kontribui al reciproka gastemo inter parokoj kaj komunumoj en nia regiono?
* Ĉu estas loko en nia areo kie kristanoj el diversaj tradicioj povas kolektiĝi por komuna preĝo, kaj se ne, ĉu ni povas helpi krei tiun lokon?

**PREĜO**
Sinjoro Jesuo, Vi petis Viajn apostolojn, ke ili kun Vi vigladu kaj preĝu. Koncedu, ke ni proponu al la mondo sekuran spacon, kie eblas trovi plifortiĝon kaj trankvilon, por ke komuna preĝo kun aliaj kristanoj helpu nin funde ekkoni sin.
Amen.

## LA OKA TAGO: Koroj kiuj brulas por unueco

**Jesaja 52, 7-9**
*Kiel ĉarmaj estas sur la montoj la piedoj de anoncanto, kiu proklamas pacon, anoncas bonon*

Kiel ĉarmaj estas sur la montoj la piedoj de anoncanto, kiu proklamas pacon, anoncas bonon, sciigas pri helpo, diras al Cion: Reĝas via Dio! Jen eksonis la voĉo de viaj gardostarantoj; ili levas la voĉon kaj kune ĝojkrias, ĉar per siaj propraj okuloj ili vidas, kiel la Eternulo revenas al Cion. Triumfu, ĝojkriu kune, ho ruinoj de Jerusalem; ĉar la Eternulo konsolis Sian popolon, liberigis Jerusalemon.

**Psalmo 30**
*Vi anstataŭigis al mi mian plendon per danco*

Mi gloros Vin alte, ho Eternulo,
Ĉar Vi levis min kaj Vi ne lasis miajn malamikojn triumfi super mi.
Ho Eternulo, mia Dio, mi vokis al Vi,
Kaj Vi min sanigis.
Ho Eternulo, Vi ellevis el Ŝeol mian animon;
Vi vivigis min, ke mi ne iru en la tombon.
Kantu al la Eternulo, ho Liaj piuloj,
Kaj gloru Lian sanktan nomon.
Ĉar nur momenton daŭras Lia kolero,
Sed tutan vivon daŭras Lia favoro;
Vespere povas esti ploro,
Sed matene venos ĝojego.
Kaj mi diris en la tempo de mia feliĉo:
Mi neniam falos.
Ho Eternulo, per Via favoro Vi starigis mian monton fortike;
Sed kiam Vi kaŝis Vian vizaĝon, mi konfuziĝis.
Al Vi, ho Eternulo, mi vokis,
Kaj al la Eternulo mi preĝis:
Kion utilos mia sango, se mi iros en la tombon?
Ĉu gloros Vin polvo? ĉu ĝi aŭdigos Vian veron?
Aŭskultu, ho Eternulo, kaj korfavoru min;
Ho Eternulo, estu helpanto al mi.
Vi anstataŭigis al mi mian plendon per danco;
Vi deprenis de mi mian sakaĵon kaj zonis min per ĝojo,
Por ke mia animo kantu al Vi kaj ne silentiĝu.
Ho Eternulo, mia Dio, eterne mi Vin gloros.

**Koloseanoj 1, 27-29**

*[…] ĉi tiu sekreta plano, granda kaj mirinda, pretigita por ĉiuj homoj. Kaj jen la sekreto: Kristo ĉeestas en vi*

Al kiuj Dio volis sciigi, kia estis la riĉeco de la gloro de ĉi tiu mistero inter la nacianoj; kiu estas Kristo en vi, la espero de gloro; kaj kiun ni anoncas, admonante ĉiun homon kaj instruante ĉiun homon en ĉia saĝo, por ke ni starigu ĉiun homon perfekta en Kristo Jesuo; por tiu celo mi ankaŭ laboras, klopodante laŭ lia energio, kiu energias en mi kun potenco.

**Luko 24, 13-36**

*[...] komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem*

Kaj jen du el ili iris en tiu sama tago al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas malproksime de Jerusalem sesdek stadiojn. Kaj ili interparolis inter si pri ĉio tio, kio okazis. Kaj dum ili interparolis kaj diskutis inter si, Jesuo mem alproksimiĝis kaj iris kun ili. Sed iliaj okuloj estis malhelpataj tiel, ke ili lin ne rekonis. Kaj li diris al ili: Kiaj vortoj estas tiuj, kiujn vi interŝanĝas, dum vi iras? Kaj ili haltis, kun malgaja mieno. Kaj unu el ili, nomata Kleopas, responde diris al li: Ĉu nur vi sola loĝas en Jerusalem, kaj ne scias tion, kio tie okazis en ĉi tiuj tagoj? Kaj li diris al ili: Kion? Kaj ili diris al li: Pri Jesuo, la Nazaretano, kiu estis profeto potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo; kaj kiel la ĉefpastroj kaj niaj regantoj transdonis lin por kondamno al morto, kaj lin krucumis. Sed ni esperis, ke li estas tiu, kiu elaĉetos Izraelon. Kaj plie, krom ĉio tio, hodiaŭ estas jam la tria tago, de kiam tio okazis. Ankaŭ mirigis nin iuj virinoj el inter ni, kiuj estis frumatene apud la tombo, kaj ne trovinte lian korpon, revenis, dirante, ke ili ankaŭ vidis vizion de anĝeloj, kiuj diris, ke li vivas. Kaj iuj el nia kunularo iris al la tombo, kaj trovis tiel, kiel diris la virinoj; sed lin ili ne vidis. Kaj li diris al ili: Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi ĉion, kion la profetoj antaŭparolis! Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron? Kaj komencante de Moseo kaj de ĉiuj profetoj, li klarigis al ili el ĉiuj Skriboj la dirojn pri li mem. Kaj ili alproksimiĝis al la vilaĝo, kien ili iris, kaj li ŝajnigis al ili, kvazaŭ li pluen iros. Kaj ili retenis lin, dirante: Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas. Kaj li eniris, por resti ĉe ili. Kaj dum li sidis kun ili ĉe manĝo, li prenis panon, kaj ĝin benis kaj dispecigis kaj donis al ili. Kaj iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis lin, kaj li fariĝis nevidebla por ili. Kaj ili diris unu al alia: Ĉu nia koro ne brulis en ni, dum li parolis kun ni sur la vojo, dum li klarigis al ni la Skribojn? Kaj leviĝinte en tiu sama horo, ili reiris al Jerusalem, kaj trovis la dek unu kunvenintaj, kun siaj kunuloj, kaj dirantaj: La Sinjoro vere leviĝis, kaj aperis al Simon. Kaj ili rakontis tion, kio okazis sur la vojo, kaj kiamaniere li rekoniĝis al ili en la dispecigo de pano. Kaj dum ili priparolis tion, li mem staris meze de ili, kaj diris al ili: Paco al vi.

**KOMENTO**
Diversaj Eklezioj en Latvio povis kune labori por la evangelizado utiligante Kurson Alfa-renkontiĝojn pri la temo de la kristana kredo. Latvoj, kiuj akceptis la kredon pere de tiu ĉi programo, estas malfermitaj por la plua konatiĝo kaj pliriĉigo per la donacoj de aliaj kristanaj komunumoj. Tiu ĉi atesto inspiris jenajn pripensojn.
* Seniluziĝintaj disĉiploj, kiuj forlasas Jerusalemon por Emaus, perdis la esperon, ke Jesuo estas la Mesio.
* Kontraŭe al tiu malĝoja sperto, plenaj de espero ili revenas al Jerusalemo kun la premiso de Evangelio. Ĝi estas premiso de resurekto, kiu gvidas ilin denove al la koro de la komunumo kaj al la komunumo de la amikeco.
*Tiel ofte kristanoj provas evangelizi en la spirito de rivalado kun espero de la pligrandigo de siaj Eklezioj. La ambicio detruas dezirojn, por ke aliaj ekaŭdu la premison de la Evangelio. La vera evangelizado estas vojaĝo el Emaus al Jerusalemo, vojaĝo el la izoliĝo al la unueco.

**DEMANDOJ POR LA PERSONA PRIMEDITO**
* Kiuj seniluziĝoj izolas nin de aliaj?
* Kiujn donacojn, iniciatojn, metodojn kaj programojn ni povas ricevi de aliaj kristanoj?

**PREĜO**
Sinjoro Jesuo, Vi faris, ke brulu en ni koroj, kaj Vi sendis nin denove al la vojo de niaj fratoj kaj fratinoj kun premiso de la Evangelio en la buŝoj. Helpu al ni sperti, ke espero kaj obeo al Vi ĉiam gvidas al la plena unueco de Via popolo. Amen.

# LA EKUMENA SITUACIO EN LATVIO

## I. La kristanaj eklezioj

"Vivanta ekumenismo": ĉi tiuj vortoj karakterizas la ekumenan situacion en Latvio hodiaŭ. Kristanoj de diversaj tradicioj ĉiam pli ofte renkontiĝas por komuna preĝado kaj komuna atestado en kreskanta nombro de lokoj kaj okazoj. Parto de ĉi tiu dinamiko devenas de la fakto, ke la tri plej grandaj konfesioj estas proksimume egalaj laŭ nombroj, kaj la pli malgrandaj eklezioj estas tre aktivaj. Latvio estas ia vojkruciĝo inter la katolika, protestanta kaj ortodoksa tradicioj. Laŭ oficialaj donitaĵoj publikigitaj en 2011, 34,3% de la loĝantaro estas luteranoj, 25,1% estas romkatolikoj, 19,4% estas ortodoksuloj kaj malnovritanoj, 1,2% estas aliĝintoj de aliaj kristanaj eklezioj (kiel baptistoj, adventistoj, pentekostismanoj, kaj aliaj liberaj eklezioj), kaj 20% estas aliĝintoj de aliaj religioj aŭ de neniu religio. Latvio oficiale agnoskas ses religiajn tradiciojn: luteranoj, katolikoj, baptistoj, ortodoksuloj, malnovritanoj kaj judoj.

## II. Travivata ekumenismo

Kvankam eklezioj en Latvio ne estas kuniĝintaj en nacia konsilio de eklezioj, la ekumena vivo estas daŭre fruktodona. Kunlaborado inter kristanoj en Latvio estas nemalhavebla hodiaŭ por ke la kristana mesaĝo atingu la nuntempan postmodernan socion en ĝiaj plenaj diverseco kaj abundo de opinioj. La ekumena kunlaboro kaj rilatoj inter diversaj konfesioj en Latvio, estas, oni povus diri, bazita sur la proklamado de la potencaj agoj de la Sinjoro.

Regula praktiko en Latvio estas tio, ke episkopoj de la katolika, ortodoksa, luterana kaj baptistaj eklezioj direktas komunan mesaĝon al la socio pri demandoj de la etiko, la protekto de la vivo, aŭ socia justeco. Pro la fratecaj rilatoj inter la estroj de la romkatolika kaj luterana eklezioj en Latvio, la konsekro de la nuna romkatolika ĉefepiskopo okazis en la luterana katedralo de Rigo.

La gvidantoj de la diversaj eklezioj kuniĝas dum la festado de la plej gravaj memortagoj kaj festotagoj, kiel la Nacia Tago de Sendependeco je la 18-a de novembro. Oni proklamas la Vorton de Dio, faras paroladojn, kaj muzikistoj de multaj kristanaj eklezioj partoprenas.

Tiuj samaj gvidantoj renkontiĝas ĉiujare en la Konsilantaro pri Spiritaj Aferoj sub la prezido de la ĉefministro. Interrilatante kun la Ŝtato, la kvar ĉefaj kristanaj tradicioj komune produktis materialojn por la uzo de ŝtataj lernejoj kun la aprobo de la Ministerio de Edukado.

Sed rilatoj inter episkopoj kaj klerikoj de latvaj kristanaj eklezioj iras preter ekumenaj Diservoj: ili estas enradikiĝintaj en vera amikeco. Ĉi tio defias la apartigajn murojn konstruitajn en antaŭaj jarcentoj, kaj ebligas ke ĉiu rekonu en la aliulo kunpastron de la Evangelio. Katolikaj, luteranaj kaj baptistaj episkopoj regule renkontiĝas. Ili preĝas, laŭdas Dion kune en frateca atmosfero, kaj diskutas aferojn kiuj koncernas Latvion.

Ankaŭ estas multaj ekzemploj de ekumena kunlaboro inter komunumoj kaj ĉe la paroĥa nivelo. Estas, ekzemple, komune organizitaj programoj de evangelizado surbaze de la Alfa Kurso. La katolikaj paroĥoj de Sankta Tereza de la Infano Jesuo kaj Sankta Maria Magdalena, la Riga Luterana Preĝejo en Tornakalns, kaj la baptista komunumo en Agenskalns kuniĝas en kunuleco, sociaj projektoj, kaj por eldoni kalendaron. Ekde la jaro 2000, la diversaj kristanaj komunumoj en Madona festas la Preĝosemajnon por la Unueco de Kristanoj ĉiun tagon en alia komunumo. Per ĉi tiu sperto okazas, ke multaj unuafoje renkontas siajn gefratojn de aliaj kristanaj tradicioj. Speciala frukto de ĉi tiu sperto estis la kreo de la unua ekumena preĝkapelo en Latvio, kie gefratoj de diversaj konfesioj povas preĝi. La pordoj de la kapelo estas malfermaj tage kaj nokte. Katolikoj kaj luteranoj laŭvice, por certigi konstantan preĝeman ĉeeston en la kapelo.
Krom aktivecoj organizitaj de eklezioj aŭ paroĥoj, estas kelkaj ekumenaj iniciatoj farataj de entuziasmaj individuaj kristanoj. Elokventa ekzemplo estas la malfermo de la unua ekumena kapelo de Sankta Johano la Baptanto kaj Maria Magdalena en la vilaĝeto Igate. La konstruado de la kapelo estis privata iniciato. Ĝin uzas anoj de la kvar ĉefaj kristanaj tradicioj de Latvio - luterana, katolika, ortodoksa kaj baptista. La konstruaĵo estis benita je la 18-a de januaro 2013 de la katolika, luterana kaj baptista episkopoj. Unu el la specialaj preĝintencoj de la popolo de Igate estas pri la infanoj, naskiĝintaj kaj nenaskiĝintaj, kaj pri iliaj patrinoj, kaj por helpi ilin.
Alia ekzemplo de individua iniciato estis la Pintokunveno de Gaizins. Laika kristano invitis la estrojn de la diversaj latvaj eklezioj renkontiĝi ĉe la plej alta monteto de Latvio, Gaizins, por kunuleco kaj preĝado. Ili akceptis. Dum la daŭro de ĉi tiuj kunsidoj, ili estis subtenataj per senĉesa preĝado kaj adorado de la fideluloj. Ĝis nun, ĉi tiu renkontiĝo estas organizita sep fojojn, kaj multe pli da ekleziaj gvidantoj aliĝis.
„Kio Unuigas Nin?“ estas revuo lanĉita antaŭ dek jaroj de individua laiko. Ĝin inspiris profunda sopiro por la unueco de la eklezio. La unua numero koncentriĝis ekskluzive pri la Preĝosemajno por Unueco de kristanoj. Poste ĝiaj diversaj numeroj estis dediĉitaj al specifaj ekumenaj temoj. La revuo estas distribuata senpage en lokaj komunumoj de diversaj eklezioj.
Ekumena kunlaboro troveblas en la diversaj preĝogrupoj kaj komunumoj Chemin Neuf', „Blua centro de rehabilitado por eksaj droguloj kaj alkoholuloj“, la „Betlehema Domo de Mizerikordo“. En ĉiuj ĉi tiuj movadoj kaj organizaĵoj, en ĉiutagaj preĝado kaj misio, kristanaj eklezioj kunligas la manojn kaj kontribuas al la kristana unueco per sia ĉiutaga servo.
Pro tio ke Latvio abundas je kristanaj tradicioj, tio influas sur la familian vivon. Estas multaj inter-ekleziaj paroj kiuj devas alfronti en la ĉiutaga vivo ĉiuj demandojn rilate al la restantaj dividoj inter kristanaj eklezioj, kiel edziĝfestoj, la katekizo de infanoj, la ĉeesto ĉe dimanĉaj Diservoj kaj, plej grave por praktikantaj kristanoj, Sankta Komunio.
Kristanaj familioj ankaŭ alfrontas la problemojn prezentatajn de nia moderna tutmondiĝinta socio. Dediĉita precipe al la servo al familioj, la 'Frataro de Kana' aktivas en Latvio ekde 1994. Ekumenaj familiaj festoj, destinitaj por atentigi pri

familiaj demandoj kaj por plifortigi familiojn, komenciĝis en 2006 kunlabore kun la urbo Rigo. Ĉi tiuj eventoj estas precipe subtenataj de diversaj liberaj eklezioj en Latvio kunlabore kun la tri pli grandaj tradicioj.
La amaskomunikiloj estas tre gravaj por evangelizado. Ekumena skipo produktas kristanajn programojn kiuj estas regule elsendataj de la Latva Ŝtata Radio kaj kiuj instigas al unueco kaj kunuleco inter latvaj kristanoj. Estas katolika videofilma informejo, „Emanuels“, kiu produktas la televidan programon „Vertikale“ por Kanalo 1. La programoj provas montri tion, kio unuigas kristanojn, kaj ne tion, kio ilin apartigas. La produktistoj de la programoj serĉas atestantojn de Kristo ĉe la ortodoksa, katolika, luterana, baptista kaj aliaj kristanaj komunumoj. Aldone, estas evangeliisma radiostacio, „Latva Kristana Radio”, kun multaj programoj de ekumena rilato.
La Krucvojo, celebrata ĉiun jaron, okazas je Sankta Vendredo en la stratoj de kelkaj urboj en Latvio - Kuldiga, Valmiera, Madona, Liepaja inter aliaj. En Rigo, la Ekumenan Krucvojon organizas la Katolika Junularejo de la Ĉefdiocezo de Rigo kaj unuigas milojn da homoj, luteranoj, baptistoj, pentekostismanoj kaj aliaj eklezioj kune kun katolikoj. Ĉe la antaŭo de la procesio, la episkopoj kaj pastroj de diversaj eklezioj kune piediras. Krom la kutima enhavo de la Krucvojo, ĝi inkluzivas konvenajn prezentadojn de profesiaj aktoroj el diversaj teatroj de Latvio kaj el diversaj konfesioj. Ĉi tiu preĝo unuigas la partoprenantojn ne nur laŭ religia, spirita maniero, sed ankaŭ laŭ kultura maniero. En ĉi tiu kuna momento de devoteco kaj pripensado, ĉiuj kristanoj estas unuigitaj de la preĝo de la Krucvojo: „Ni vin adoras vin, ho Kristo, kaj ni vin laŭdas. Ĉar per via Sankta Kruco vi elaĉetis la mondon.”

**III. Defioj por la ekumena movado**

Estas stabilaj bazoj por evoluigi ekumenismon en Latvio ĉar neniu eklezio estas superrega, kaj estas multaj ekumenaj aktivecoj. Samtempe, oni devas rekoni ke tiaj aktivecoj estas preparataj de la relative malgranda grupo de tiuj, kiuj estas tre malfermaj al ekumenaj rilatoj, dum aliflanke multaj kristanoj restas aŭ indiferentaj aŭ eĉ antagonismaj pri ili.
Alia defio estas la manko de oficialaj komisionoj pri la teologia dialogo inter la eklezioj en Latvio. Kelkaj demandoj necesigas ekumenan dialogon. Interkonsento pri ĉi tiuj demandoj certe instigus laikojn esti pli ekumene engaĝiĝintaj.
Oni povas diri ke la ekumena evoluado grandparte dependas de propraj rilatoj kaj kunuleco kiuj certigas sukcesan realigon de ekumenaj eventoj. En multaj kazoj, unu el la eklezioj prenas sur sin la iniciaton, sed la respondeco por ĝi ne tute estas dividata de la eklezioj. Areto da fervoruloj portas la plejparton de la ŝarĝo. La tasko por la eklezioj estas trovi metodon por certigi egalan dividon de la respondeco pri ekumenaj iniciatoj.
Fine, tre grava defio por la kresko de komuneco estas la politika situacio, kiu malfortigas la ligilojn de kunuleco kun gefratoj kiuj estas aliĝintoj de la latva ortodoksa eklezio (Moskva Patriarkejo). Sekve, oni devas serĉi novajn eblecojn por profundigi rilatojn.

# KELKAJ GRAVAJ DATOJ EN LA HISTORIO DE LA PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ

- ĉ.1740: En Skotlando, pentekosta movado ligita kun Nord-Ameriko, kies refervoriga mesaĝo entenas preĝojn por kaj kun ĉiuj eklezio
- 1820: Sac. James Haldane Stewart publikigis „Sugestojn por la Ĝenerala Unio de kristanoj cele al la elfluo de la Spirito“ (Hints for the outpouring of the Spirit)
- 1840: Sac. Ignatius Spencer, konvertito al la Roma Katolikismo, sugestas „Unuiĝon de preĝado por Unueco“
- 1867: La Unua Konferenco de anglikanaj episkopoj en Lambeth emfazas preĝadon por unueco en la enkonduko de siaj rezolucioj
- 1894: Papo Leono la 13-a kuraĝigas praktikon de la Preĝosemajno por la unueco kadre de festo de Pentekosto
- 1908: Unua okazigo de la „Preĝosemajno por la unueco de Eklezio“ en la januara tempo kaj laŭ hodiaŭa maniero iniciatita de sac. Paul Wattson
- 1926: La Movado „Fido kaj Konstitucio“ komencas publikigon de „Sugestoj por preĝosemajnoj por la unueco de la kristanoj“ okaze de Pentekosto
- 1935: En Francio katolika pastro Paul Couturier laboras por Ĝenerala semajno de preĝo por la unueco de la kristanoj bazita sur la komuna preĝo por „unueco kian Kristo deziras, per agoj kiujn Li deziras“
- 1941: Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ translokas la preĝon al januaro konforme al antaŭaj katolikaj iniciatoj, por ke kristanoj povu komune preĝi en la sama jarsezono
- 1958: La Ekumena centro „Kristana unueco“ el Liono en Francio komencis pretigi materialon por la Preĝosemajno kunlabore kun la Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda (Ekumena) Konsilio de Eklezioj
- 1964: Papo Paŭlo la 6-a kaj patriarĥo Atenagora la 1-a en Jerusalemo kune preĝas preĝon de Jesuo „ke ĉiuj estu unu“(Joh 17, 21)
- 1964: La „Dekreto pri ekumenismo“ de la Dua vatikana koncilio substrekas ke la preĝo estas spirito de la ekumena movado kaj ĝi subtenas Preĝosemajnon por unueco
- 1966: La Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de Eklezioj kaj la Sekretariejo por la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj) decidas kune pretigi oficialajn tekstojn por la Preĝosemajno
- 1968: la unuan fojon la preĝo por la unueco okazis surbaze de la komunaj tekstoj kiujn pretigis „Fido kaj Konstitucio“ kaj Sekretariejo por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj (hodiaŭ Papa konsilio por antaŭenigo de la unueco de la kristanoj)
- 1975: La preĝo por la unueco la unuan fojon okazis surbaze de la tekstoj kiujn pretigis loka ekumena grupo: la bazan tekston tiun jaron pretigis ekumena grupo el Aŭstralio

- 1988: La materialoj por la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj estis uzataj ĉe la diservo okaze de la fondo de la Kristana interligo de Malajzio, organo kiu kunligas pli grandajn kristanajn grupojn en tiu lando
- 1994: La teksto por tiu jaro estis pretigita kunlabore kun la laikaj ekumenaj unuiĝoj de kristana junularo Kristana unuiĝo de la vira junularo (YMCA) kaj Kristana unuiĝo de la ina junularo (YWCA)
- 2004: La Papa konsilio por antaŭenigo de la kristanoj (Katolika Eklezio) kaj Komisiono „Fido kaj Konstitucio“ de la Tutmonda konsilio de eklezioj (WCC) atingas interkonsenton kiu plifortigas la kunlaboron, ke la materialo por la Preĝosemajno por la unueco en la angla kaj francaj lingvoj estos komune kaj preparita kaj eldonita
- 2008: en la tuta mondo oni celebris 100 jarojn de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj
- 2010: Estas solene celebrata en Edinburgo kaj en la tuta mondo, per diversaj eventoj, la unua jarcento de la misia Konferenco de Edinburgo, dato kiu markas ankaŭ la komencon de la moderna ekumena Movado

## PREĜOSEMAJNO POR LA UNUECO DE LA KRISTANOJ TEMOJ 1968-2016

- En 1968, estis unue uzitaj materialoj kune preparitaj de la Komisiono pri Fido kaj Konstitucio de la Monda Konsilio de Eklezioj, kaj la Papa Konsilantaro pri la Antaŭenigo de Unueco de la Kristanoj .
- 1968: Por laŭdo de Lia gloro (Efesanoj 1,14)
- 1969: Vokitaj al libereco (Galatoj 5,13) (Prepara kunsido en Romo, Italio)
- 1970: Ni estas kunlaborantoj kun Dio (1 Korintanoj 3,9)
  (Prepara kunsido ĉe la monaĥejo de Niederaltaich, FR Gemanio)
- 1971: ... kaj la kuneco de la Sankta Spirito (2 Korintanoj 13,13)
- 1972: Novan ordonon mi donas al vi (Johano 13,34)
  (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- 1973: Sinjoro, instruu nin preĝi (Luko 11,1)
  (Prepara kunsido ĉe la abatejo de Montserrat, Hispanio)
- 1974: Ĉiu lango konfesu, ke Jesuo Kristo estas Sinjoro (Filipianoj 2,1-13)
  (Prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- 1975: La celo de Dio: sumigi en Kristo ĉion (Efesanoj 1,3-10)
  (Materialo de aŭstralia grupo. Prepara kunsido en en Ĝenevo, Svislando)
- 1976: Ni estos similaj al li; (1 Johano 3,2) aŭ, Alvokita fariĝi tio, kio ni estas
  (Materialo de Kariba Konferenco de Eklezioj. kunsido en Romo, Italio)
- 1977: Kune elteni en espero (Romanoj 5,1-5)
  (Materialo el Libano, dum interna milito. Prepara kunsido en Ĝenevo)
- 1978: Jam ne fremduloj (Efesanoj 2,13-22)
  (Materialo de ekumena grupo en Manĉestro, Anglio)
- 1979: Servu unu al la alia por la gloro de Dio (l Petro 4,7-11)
  (Materialo el Argentino - prepara kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- 1980: Venu via regno (Mateo 6,10)
  (Materialo de ekumena grupo en Berlino - prepara kunsido en Milano)
- 1981: Unu Spirito - diverseco de donacoj - unu korpo (1 Korintanoj 12,3b-13)
  (Materialo de Graymoor Fathers, Usono – kunsido en Ĝenevo, Svislando)
- 1982: Ke ĉiuj trovu sian hejmon en vi, ho Sinjoro (Psalmo 84)
  (Materialo de Kenjo - prepara kunsido en Milano, Italio)
- 1983: Jesuo Kristo – la Vivo de la Mondo (1 Johano 1,1-4) (Materialo de ekumena grupo en Irlando - prepara kunsido en Céligny/Bossey, Svislando)
- 1984: Alvokitaj esti unu per la kruco de nia Sinjoro (1 Korintanoj 2,2 kaj Kolosanoj 1,20) (prepara kunsido en Venecio, Italio)

- 1985: De morto al vivo kun Kristo (Efesanoj 2,4-7)
  (Materialo el Jamaiko - prepara kunsido en Grandchamp, Svislando)
- 1986: Vi estos miaj atestantoj (Agoj 1,6-8)
  (Materialo Slovenio)
- 1987: Unuiĝinta en Kristo - Nova Kreitaĵo (2 Korintanoj 5,17-6:4a)
  (Materialo el Anglio, prepara kunsido en Taizé, Francio)
- 1988: La amo de Dio elĵetas timon (1 Johano 4,18)
  (Materialo el Italio - prepara kunsido en Pinerolo, Italio)
- 1989: Konstrui komunumon: unu korpo en Kristo (Romanoj 12,5-6a)
  (Materialo el Kanado - prepara kunsido en Whaley Bridge, Anglio)
- 1990: Ke ili ĉiuj estu unu ... Ke la mondo kredu (Johano 17)
  (Materialo el Hispanio - prepara kunsido en Madrido, Hispanio)
- 1991: Gloru la Eternulon ĉiuj popoloj! (Psalmo 117 kaj Romanoj 15,5-13)
  (Materialo el Germanio - kunsido en Rotenburg der Fulda, FR Germanio)
- 1992: Mi estas kun vi ĉiujn tagojn... Iru do (Mateo 28,16-20)
  (Materialo el Belgio - prepara kunsido en Bruĝo, Belgio)
- 1993: Porti la fruktojn de la Spirito por la unueco de kristanoj (Galatoj 5.22-23)
  (Materialo el Zairio - prepara kunsido apud Zuriko, Svislando)
- 1994: La familio de Dio: alvokata esti unu, kore kaj mense (Agoj 4,23-37)
  (Materialo el Irlando - prepara kunsido en Dublino, Respubliko de Irlando)
- 1995: Koinonia: komuneco en Dio kaj unu kun la alia (Johano 15,1-17)
  (Materialo el Fido kaj Konstiucio, prepara kunsido en Bristol, Anglio)
- 1996: Jen mi staras ĉe la pordo kaj frapas (Apokalipso 3,14-22)
  (Prepara materialo el Portugalio, kunsido en Lisbono, Portugalio)
- 1997: Ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio (2 Korintanoj 5,20)
  (Materialo de Nordia Ekumena Konsilantaro, kunsido en Stokholmo,Svedio)
- 1998: La Spirito helpas nian malfortecon (Romanoj 8,14-27)
  (Prepara materialo el Francio, kunsido en Parizo, Francio)
- 1999: Dio loĝos kun ili, kaj ili estos Lia popolo (Apokalipso 21,1-7)
  (Prepara materialo el Malajzio, kunsido en Monaĥejo de Bose, Italio)
- 2000: Benata estu Dio kiu benis nin en Kristo (Efesanoj 1,3-14)
  (Prepara materialo de la Konsilantaro de la Eklezioj de Mezoriento, kunsido en La Verna, Italio)
- 2001: Mi estas la Vojo, la Vero kaj la Vivo (Johano 14,1-6)
  (Prepara materialo de Rumanio kaj kunsido ĉe Vulcan, Rumanio)

- 2002: Ĉe Vi estas la fonto de vivo (Psalmo 36,5-9)
(Prepara materialo CEEC kaj CEC, kunsido apud Augsburg, Germanio)
- 2003: Ni havas ĉi tiun trezoron en argilaj vazoj(2 Korintanoj 4,4-18)
Prepara materialo el eklezioj en Argentino, kunsido ĉe Los Rubios, Hispanio)
- 2004: Mian pacon mi donas al vi (Johano 14,23-31)
(Prepara materialo el Aleppo, Sirio - kunsido en Palermo, Italio)
- 2005: Kristo, unika fundamento de la Eklezio (1 Korintanoj 3,1-23)
(Prepara materialo de Slovakio - kunsido en Piestaňy, Slovakio)
- 2006: Ĉar kie du aŭ tri kunvenas en mia nomo, tie mi estas meze de ili (Mateo 18,18-20)
(Prepara materialo el Irlando - kunsido en Prosperous, Co. Kildare, Irlando)
- 2007: Li igas la surdulojn aŭdi, kaj la mutulojn paroli (Marko 7,31-37)
(Prepara materialo el Sud-Afriko – kunsido en Faverges,Francio)
- 2008: Preĝu senĉese (1 Tesalonikanoj 5, 12a.13b-18)
(Prepara materialo el Usono – kunsido en Graymoor, Garrison, Usono)
- 2009: Ke ili fariĝu unu en Via mano (Ezekiel 37,15-28)
(Prepara materialo el Koreio – kunsido en Marsejlo, Francio)
- 2010: Vi estas atestantoj pri tio (Luko 24,48)
(Prepara materialo de Skotlando – kunsido en Glasgovo, Skotlando)
- 2011: Ili persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj (Agoj 2,42)
(Prepara materialo el Jerusalemo – kunsido en Saydnaya, Sirio)
- 2012: Ni ĉiuj estos ŝanĝitaj de la venko de Jesuo Kristo nia Savanto (1 Korintanoj 15, 51-58)
(Prepara materialo el Pollando – kunsido en Varsovio, Pollando)
- 2013: Kion la Sinjoro postulas de ni (Miĥa 6, 6-8)
Prepara materialo el Hindio – kunsido en Bengaluro, Hindio)
- 2014: Ĉu Kristo estas dividita? (1 Korintanoj 1,1-17)
(Prepara materialo el Kanado – kunsido en Montrealo, Kanado)
- 2015: „Donu al mi trinki“ (Joh 4,7)
(Prepara materialo el Brazilo – kunsido en São Paulo)
- 2016: „Vokitaj por anonci al ĉiuj la mirindaĵojn de Dio“*(kp. 1 Pet 2,9)*
(Prepara materialo el Latvio – kunsido en Riga)

# ENHAVO


- Enkonduko 3
- Biblia teksto (1 Pet 2,9-10) 4
- Teologia paŝtista enkonduko 4
- Preparo de la materialo 7
- Ekumena diservo 8
- La bibliaj meditoj kaj preĝoj dum ok tagoj 15
- La unua tago: Derulu la ŝtonon 15
- La dua tago: Vokitaj esti perantoj de espero 17
- La tria tago: Frateca atesto 19
- La kvara tago: Pastra popolo vokata prediki la evangelion 21
- La kvina tago: Kunuleco de la apostoloj 23
- La sesa tago: Aŭskultu tiun ĉi sonĝon 25
- La sepa tago: Gastemo per la preĝo 27
- La oka tago: Koroj kiuj brulas por unueco 29
- La ekumena situacio en Latvio 32
- Kelkaj gravaj datoj el la historio de la Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj 35
- Preĝosemajno por la unueco de la kristanoj : Temoj 1968-2016 37
- Enhavo 40